



Penso  
kaj **Vivo**

EMMANUEL

---

FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER



Francisco Cândido Xavier  
(Mediumo)

# Penso kaj Vivo

**Diktita de la Spirito**  
EMMANUEL

1<sup>a</sup> eldono  
2000

El la 1<sup>a</sup> eldono portugallingva esperantigis:  
Affonso Borges Gallego Soares

Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz  
Korespondadreso: Caixa Postal 3.133  
BR – 20002-970 – Rio de Janeiro-RJ – Brazilo

La Direktoroj kaj Konsilantoj de la Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz ne ricevas ajnan honoraron.

La publikigo de ĉi tiu libro celas informi esperantistojn pri la principoj de la Spiritisma Doktrino kaj la realaĵoj de la transtomba vivo.

Ĉiuj rajtoj por eldoni en Esperanto estis transdonitaj de la Brazila Spiritisma Federacio al la Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz.

El la 1<sup>a</sup> eldono portugallingva esperantigis Affonso Borges Gallego Soares.

Kompostado de VIDA Editoração Eletrônica, RJ (Brasil)  
Presita de Folha Carioca Ltda., Rio de Janeiro, RJ (Brasil)

ISBN 85-86984-13-2

CATALOGAÇÃO NA FONTE  
DO  
DEPARTAMENTO NACIONAL DO LIVRO

E54p Emmanuel (Espírito)  
Penso kaj vivo / diktita de la spirito Emmanuel;  
[psicografado por] Francisco Cândido Xavier. – 1<sup>a</sup> ed.  
– Rio de Janeiro: F. V. Lorenz, 2000.  
ISBN 85-86984-13-2  
1. Obras psicografadas. 2. Espiritismo. I. Xavier,  
Francisco Cândido, 1910–.

CDD– 133.93

Eldonis

SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ

Sidejo: Rua dos Inválidos n° 34 grupo 903

BR – 20231 –040 – Rio de Janeiro (RJ) – Brazilo

## TABELO DE LA ENHAVO

	Pĝ
<i>Penso kaj Vivo</i> .....	9
1 – La spegulo de la vivo .....	11
2 – Volo .....	15
3 – Kunlaboro .....	19
4 – Instruo .....	23
5 – Eduko .....	27
6 – Fido .....	31
7 – Laboro .....	35
8 – Asociiĝo .....	39
9 – Sugesto .....	43
10 – Komprenemo .....	47
11 – Lulilo .....	51
12 – Familio .....	55

13 – Filoj.....	59
14 – Korpo.....	63
15 – Sano.....	67
16 – Alvokiĝo.....	71
17 – Profesio.....	75
18 – Socio.....	79
19 – Prospero.....	83
20 – Kutimo.....	87
21 – Devo.....	91
22 – Kulpo.....	95
23 – Helpo.....	99
24 – Humileco.....	103
25 – Toleremo.....	107
26 – Preĝo.....	111
27 – Obsedo.....	115
28 – Malsano.....	119
29 – Morto.....	123
30 – Amo.....	127

## **Penso kaj Vivo**

*Amika koro nin demandis, ĉu ni ne havas en la Spirita Mondo iun libron adapteblan al la bezonoj de la surtera homo. Iujn paĝojn, kiuj al la spirito parolus pri la problemoj de la spirito... Ion malpezan kaj tuj kompreneblan, kiu resumus la superajn principojn orientantajn al ni la iradon...*

*Kaj ni memoris tiucelan, simplan parolgvidilon, kiun ni disponas en niaj servoj al la kamaradoj, sin direktantaj al la lulilo, kaj kiun ni uzas en niaj regeneraj lernejoj inter la morto kaj la renaskiĝo.*

*Temas ja pri humilaj notoj, kiuj fontas el la cerbo simile al la floroj, kiuj, burĝonante el la grundo, tamen esence apartenas al la ĝardeno, kiu ilin gastigas, ĉar ili efektive naskiĝas el la Boneco de Dio, kiu kunigas la Sunon kaj la teron, la fonton kaj la aeron, la sterkon kaj la venton, por al la floroj havigi koloron kaj formon, belecon kaj parfumon...*

*Jen do ĉi tie, kiel eble adaptita al la kampo de la homa spertado, nia simpla gvidilo.*

*“Penso kaj Vivo” ni ĝin nomas en la Spirita Mondo, kaj kun tiu sama titolo ni ĝin disponigas al niaj fratoj en la vivo-batalado kelkatempe enfermitaj en la fizika sfero, celante ankoraŭfoje instrui, ke nia penso, per la reflektado de nia memo, kreas la vivon, kiun ni serĉas, ĝis ni iam, en la daŭro de la jarmiloj, agordos al la senlima Saĝo kaj al la senlima Amo, kiuj konsistigas la Penson kaj la Vivon de Nia Patro.*

EMMANUEL

*Pedro Leopoldo, la 11-an de Februaro 1958.*

# 1

## La spegulo de la vivo

Ĉie la menso montriĝas kiel la spegulo de la vivo.

Sur la Tero ĝi altiĝas al Dio, sub la egido de la Kristo, simile al la kruda diamanto, kiu, ŝirite el la malluma sino de la grundo, estas alkondukita de la tajlisto al la brilego de la lumo.

Ĉe la primitivaj estaĵoj ĝi aperas sub la gango de la instinkto, ĉe la homaj animoj ĝi vidiĝas inter la iluzioj, kiuj alsaltas la inteligenton, kaj ĉe la Perfektaj Spiritoj ĝi sin montras kiel altvaloran brilanton respegulantan la Dian Gloron.

Ĝin studante de nia spirita pozicio, limigitaj inter la besteco kaj la anĝeleco, ni nepre devas



kompreni ĝin kiel la kampon de nia konscienco vekiginta ĉe la evolustadio, en kiu la akirita sciado al ni permesas agi.

Difinante ĝin kiel spegulon de la vivo, ni rekonas, ke la koro estas ĝia faco kaj ke la cerbo estas la centro de ĝiaj ondoj generantaj la forton de la penso, kiu ĉion movas, kreante kaj transformante, detruante kaj restarigante por ĉion purigi kaj sublimigi.

Tial en ĉiuj regionoj de la Universo vibras la reciproka influado.

Ĉio moviĝas kaj renoviĝas laŭ la principoj de interdependeco kaj reefiko.

La reago naskas la afekcion.

La afekcio formas la ideon.

La ideo estigas la sintenon kaj la parolon, kiuj regas la farojn.

Ĉe tiaj manifestiĝoj, etendiĝas la fadenoj generantaj la kaŭzojn, de kiuj naskiĝas la cirkonstancoj efikantaj sur la vivo kiel obstrukcaj klapoj aŭ kiel liberigaj helpiloj.

Neniu povas improvize translimi la povojn de sia menso, irante tre malproksimen ekster sia agadrondo; sed ni ĉiuj ricevas la influojn, unuj de la aliaj, laŭ nia relativa asimilkapablo.

Neniu restas for de tiu senĉesa interŝanĝado.

Ni spiras en la mondo de la imagoj, kiujn ni elsendas kaj ricevas kaj per kiuj aŭ ni haltas sub la fascino de elementoj nin kelkatempe sklavigantaj, aŭ ni akceptas la renovigan influon de la potencoj nin instigantaj al puriĝo kaj al progreso.

La mensa reflektado sidas en la fundamento de la vivo.

La kreitoj sin reciproke respegulas en la Kreitaro, kiu reflektas la celojn de la Kreinto.

## 2

### Volo

Ni komparu la homan menson - vivantan spegulon de la klarvida konscienco - al granda kontoro, dividita en diversajn servofakojn.

Tie troviĝas la Fako de l' Deziro, kie agas la decidoj kaj aspiroj subtenantaj la impulson al laboro; la Fako de la Inteligento, vastiganta la konkerojn de la evoluo kaj de la kulturo; la Fako de la Imago, kolektanta la riĉaĵojn de la idealo kaj sentemo; la Fako de la Memoro, arkivanta la resumojn de la sperto, kaj ankoraŭ aliaj fakoj difinantaj la investojn de la animo.

Sed super ĉiuj staras la Sekcio de la Volo.

La Volo estas la klera kaj vigla administracio, reganta ĉiujn fakojn de la mensa agado.

La Dia Providenco donis ĝin, kiel luman aŭreolon al la racio, post la multjarmila vojaĝo de la kreito tra la obskuraj regionoj de la instinkto.

Por taksii ĝian gravecon, sufiĉas memori, ke ĝi rudras ĉiuspecajn fortojn alkolektiĝintajn al nia sciado.

Elektro estas dinamika energio.

Magnetismo estas energio statika.

Penso estas elektro-magneta forto.

Penso, elektro, magnetismo kunagas en ĉiuj manifestiĝoj de la Universa Vivo, kreante graviton kaj afinecon, asimilon kaj malasimilon sur la multoblaj kampoj de la formo, kiuj servas al la migrado de la spirito direkte al la Superaj Celoj, difinitaj de la Dia Plano.

La Volo, tamen, estas la decida puŝo.

En ĝi ni disponas potencon prebutonon, kiu decidigas la funkciadon aŭ la inertecon de la maŝino.

La cerbo estas la dinamo, kiu produktas la mensan energion laŭ sia reflektivo, sed en la Volo ni vidas la komandon, kiu direktas la mensan energion sur tiun aŭ tiun alian vojon, starigante kaŭzojn, kiuj difinas la problemojn de la destino.

Sen ĝi, la Deziro povas ĉerpi el la trompo afliktajn jarcentojn da riparado kaj sufero, la Inteligento povas kaptiĝi en la karceron de l' krimado, la Imago povas naski danĝerajn monstrojn en la ombro, kaj la Memoro, kvankam fidela al sia funkcio de registrilo, laŭ la destino al ĝi asignita de la naturo, povas fali en bedaŭrindan malviglecon.

Nur la Volo estas sufiĉe forta por tenadi la harmonion de la spirito.

Efektive, ĝi ne kapablas bari la mensan reefikon sur la kampo de la rilatoj inter similuloj, ĉar la agordiĝo estas nenuligebla leĝo, sed ĝi povas trudi disciplinon al la elementoj, kiujn ĝi direktas, por teni ilin koheraj en la fluo de l' bono.

## 3

### Kunlaboro

Por ke iu efike kaj sukcese direktu gravan entreprenon, ne sufiĉas lin enoficigi.

De li oni postulas, ke li havu superajn kvalitojn por ke la afero solidiĝu kaj prosperu. Ne nur aŭtoritato sed saĝa direktado. Ne nur teorio kaj klereco sed virto kaj klara mezurtaksado.

Vastaj rimedoj en la manoj de senprudenta kapo similas al trezoroj en la brakoj de l' malsaĝeco, same kiel riĉeco sen gvido estas kvazaŭ ŝipo drivanta.

Kiu estras, tiu nepre uzas justecon kaj bonecon, laboron kaj disciplinon por atingi la celojn de la tasko al li komisiita.

Kiam povo malmoderas, la popolo suferas maltrankvilon kaj malordon, kaj kiam inteligenton ne gvidas sana karaktero, ĝi ĉirkaŭen dissemas mizeron kaj kruelecon.

Jen kial ekzistas tiom da tiranoj aŭreolitaj per mensa grandeco kaj tiom da genioj kun rafinita sentemo, sed tamen baraktantaj en la kotejo de l' malvirto.

En la intima mondo, la volo estas kiel kapitano, kiu ne povas malzorgi sian taskon.

Kaj kiel la administranto de iu servo bezonas la helpon de kompetentaj asessoroj, tiel same la volo ne povas malhavi la pripenson kaj la logikon kiel respektindajn konsilantojn en la decidopova estreco.

Sed nepre necesas alvoki la spiriton de kunlaboro por subteni ĝiajn impulsojn. En la kampo de la surtera agado, la kompetenta orientisto ne ignoras la naturan hierarkion, kiu regas ĉiujn valorojn nepre necesajn al la vivo.

En la fabrikado de vestoj, la fadeno kalkulos je la apogo de la maŝino, la maŝino fidos la kompetentecon de la laboristo, la laboristo konfidos la teknikiston kontrolantan lian laboron, la teknikisto trovos subtenon ĉe la estraro de la fabriko, kaj la fabrik-estraro serĉos ekvilibron ĉe la industria produktado, de kiu ili ĉerpos

la financan brulaĵon necesan al la funkciado de la laborejo obeanta ilian komandon.

Ni rimarkas do, ke en la Individuo-Ŝtato la volo, por plenumi la ĝin koncernantan regadon, sen kolapso de la ekvilibro, devas helpi al si per kunlaboro por lumigo de sia aktiveco.

La spontanea kunlaboro estas la ĉefa elemento de la ordo.

De la Dia Gloro ĝis la subatomaj limoj, la Universon oni povas difini, kiel ĉenon da vivoj kunligitaj en la Granda Vivo.

Kunlaboro signifas konstruan obeadon al la postuloj de la fronto kaj implicitan helpon al la mankoj de la malantaŭo.

Kiu helpas, tiu estas helpata, kaj ĉe tio li silente trovas la plej trafan formulon por alkonformiĝi al la evolu-procesoj.



## 4

### Instruo

Oni jam diris, ke du flugiloj kondukos la homan spiriton al Dio.

Unu estas nomata Amo, Saĝo estas la alia.

Per la amo, kiu super ĉio estas amo al la proksimulo, la homo sin lumigas kaj beligas interne, elsendante, helpe al aliaj homoj, la reflekon de siaj virtoj; kaj per la saĝo, kiu komenciĝas per la scioakirado, li rikoltas la influon de la avangardo de l' progreso, kiu al li komunikas la reflektajn de sia grandeco, lin puŝante en la Alton.

Per la amo ni valorigas nin por la vivo.

Per la saĝo ni estas valorigataj de la vivo.

De tio venas la imperativo, ke inteligento kaj boneco kune marŝu.

Boneco senscia estas kvazaŭ amika puto en plena ombro, kiu sensoifigas vojaĝanton sen instrui lin pri la vojo.

Inteligento senama povas esti komparata al valora montra fosto, kiu indikas al migranto la ĝustan direkton sed lasas lin pere tiurmentata de l' soifo.

Ni ĉiuj bezonas instruon kaj amon..

Studi kaj servi estas vojoj neeviteblaj ĉe la klopodoj por altiĝo.

La intelekta kulturo estas tute formita laŭ ĉeno de grada disvastiĝo.

La civilizacioj seninterrompe sin sekvas sub la efiko de la mensa heredo.

La arto, en parolo aŭ muziko, grifelo aŭ peniko, disvolviĝas kaj perfektigatas pere de la resendo esprimata per la laboro de la kulturantoj de l' belo, kiuj sin reciproke inspiras.

La lernejo estas centro de inspira instigado, kie la hodiaŭaj instruistoj kontinuigas la laboron de la hieraŭaj.

La libro prezentas potence altirfortan magneton, modlanton de la emocioj kaj konceptaĵoj, de kiuj fontas

la grandaj movadoj de la Homaro en ĉiuj kampoj de religio kaj scienco, opinio kaj tekniko, penso kaj laboro. Ĉe tiu dinamismo de kreiva energio ni trovas la plej altajn rimedojn de mens-influa telekomunikigo, ĉar trans nemezureblaj distancoj, en spaco kaj tempo, ni asimilas la ideojn de la superaj spiritoj, kiuj antaŭ jarcentoj pasis inter ni.

Sokrato reflektiĝas en la verkoj de la disĉiploj, kiuj intime kunvivis kun li, kaj ankoraŭ hodiaŭ ni nutras nin per liaj noblaj pensoj.

Jesuo bildiĝas en la libroj de la apostoloj, kiuj disvastigis lian verkon, kaj la Evangelio ja estas kristalklara spegulo, en kiu, per dia reflektado, la Majstro reaperas, orientante la homan konduton por la konstruado de la Dia Regno inter ni.

Scii estas favori nian propran liberiĝon, prenante la vojon al novaj horizontoj en la vivo.

Koncernas nin do la devo ĉiam studi, elektante la plej bonan, por ke niaj ideoj kaj ekzemploj respegulu la ideojn kaj ekzemplojn de l' ĉampionoj de la lumo.

## 5

### Eduko

Admonis al ni la Kristo: “lumu via lumo...”<sup>1</sup>

Kaj li mem, la Dia Majstro, estas nia dia lumo ĉe la surplaneda evoluo.

Oni iam akceptis, ke la admono de la Sinjoro estas nura avizo mistiknatura, instiganta konfesantojn de la religiaj eksteraj kultoj al supozata postmorta elstareco en ia imaga ĉiela kortego.

Ni tamen hodiaŭ agnoskas, ke la leciono de Jesuo devas esti aplikata ĉiutage, en ĉiaj situacioj.

---

<sup>1</sup> Mateo, 5:16 – Noto de la spirita aŭtoro.

La nuntempa surtera scienco mem konstatas la ĉiean ĉeeston de lumo.

La homa korpo, konvene studita, montriĝis ne plu kiel kompakta materio sed ja kiel iaspeca energia portilo, strukturita per infinitezimaj partikloj, kiuj sin reciproke altiras kaj repuŝas, estigante mikroskopajn lumeksplodojn.

Kemio, Fiziko kaj Astronomio elmontras, ke la surtera homo loĝas regnon trakuratan de radioj.

En la sino de tiu glora imperio de la energio troviĝas la mensaj radioj, reguligantaj la elementojn, per kiuj la vivo esprimiĝas.

La penso estas kreiva forto, kiu eksteriĝas el la elsendanto pere de subtilaj ondoj, en cirkvitoj de ago kaj reago en la tempo. Ĝi estas tiel mezurebla kiel la fotono, kiu, eljetita de la ĝin produktanta lumfonto, trakuras la spacon kun difinita rapido, subtenante la brilegan spiron de la Kreado.

La homa menso, ni ripetas, estas luma spegulo elsendanta kaj asimilanta radiojn.

Sed tiu spegulo restas pli malpli enfermita en la densaj ombroj de la nescio, simile al multekosta ŝtono inkrustiĝinta en kaverna erco aŭ en la anfraktoj de abismo. Por ke ĝi reflektu la ĉielan radiadon kaj el si mem

ŝprucigu la propran brilon, nepre necesas, ke ĝi malimplikiĝu el la tenebroj helpe de la smirgo de l' laboro.

Ni do konstatas la neformeteblan necesecon de eduko ĉe ĉiuj estaĵoj.

Ni memoru, ke la Eterna Bonfaranto per sia parola instruo ordonforme difinis tiun admonon, kiun ni nun pritraktas:

“Lumu via lumo.”

Tio signifas, ke la lumpotencialo de nia spirito devas brilegi per sia tuta grandeco, kio atingebblas nur per la eduko, nin submetanta al la konvena cizelado.

Sed la edukon, kiu kulturus la intelekton kaj perfektigus la intiman estecon, glorigante scion kaj bonecon, klarecon kaj virton, oni ne atingos nur helpe de la instruo, efikanta de ekstere internen, sed ja per la konscia aliĝo de la volo.

Estas ja la volo, kiu, per si mem strebante al bono, sub nenia premo, povas liberigi kaj poluri la koron, sur ĝi ĉizante la kristalpuran facon de la animo, kapablan reflekti la Gloran Vivon kaj transformi la cerbon en altvaloran uzinon de supera energio elsendanta rebrilojn de beleco kaj sublino.

## 6

### Fido

Por trovi la bonon kaj asimili ĝian lumon, ne sufiĉas agnoski ĝian ekziston. Nepre necesas ĝin serĉi kun persisto kaj fervoro.

Neniu povas pridubi la elektron, sed por ke lampo lumigu ĉambron oni sin helpas per konduktaj dratoj, kiuj transportu ĝian forton, de la malproksima uzino ĝis la interno de nia domo.

Fotografio estas nuntempe banala afero, sed, por ke la bildo fiksiĝu, ĉe preparado de foto, estas necese, ke la gelata emulsio sentivigu la koncernan plakon.

La homa voĉo transsendiĝas radiofonie, de unu kontinento al alia, kun absoluta fideleco, sed por tio ĝi

nepre bezonas la elektronan kirlon, kiu, konvene subigita, transportas ĝian moduladon.

Ni do ne povas realigi ion ajn sen pozitiva konfido.

Sed kiel esprimi la fidon ? – oni multfoje demandas.

Fido ne havas difinon en la ordinara lingvo.

Ĝi estas forto naskiĝanta kun la animo, instinkta certeco pri la Dia Saĝo, kiu estas la saĝo de la vivo mem. Ĝi pulsas en ĉiuj kreitoj, vibras en ĉiuj aĵoj, montriĝas en la fendita kristalo, kiu humile rekunmetiĝas, kaj vidiĝas en la dehakita arbo, kiu iom post iom sin rebonigas helpe de la renovigaj leĝoj regantaj la Naturon.

Ĉiuj agoj de la ekzistado iel disvolviĝas sub la potenco de l' fido.

Konfidante la forton de la printempo, la kampo kovriĝas per floroj.

La rivero, fidante la realecon de la fonto, ĝin ne povas malhavi por fluigi sian larĝan, profundan torenton.

Ĉe la homo, la simpla manĝo estas spontanea ago de fido. Sin nutrante, li fidas la abdomenajn viscerojn, kiujn li ne vidas.

Ĉia sukceso en la socia kunvivado rezultas de la fido, kiun la kolektivo metas sur la respekton al la leĝaj preskriboj regantaj ilian vivon.



Se ni konsciencie utiligas tian potencon, tiam al ni eblas eviti longajn kurbiĝojn sur nia evolua vojo.

Tiacele, kia ajn nia religia koncepto pri Dio, nepre necesas plifortigi en ni la fidon al la bono, por respeguliti ties grandecon.

Ni prezentu al ni la lenson kaj la Sunon. La astro de l' tago egale disdonas siajn rimedojn, sed se ni konverĝigas ĝiajn radiojn per ordinara lenso, ni ricevas pli potencajn efikon.

La Eterna Bono same lumas al ĉiuj, sed, koncentrante ĝian forton sur nin pere de pozitiva, intima certeco, ni sendube pli efike respegulos ĝian gloron.

Ni do senlace strebu al ĝi, ne haltante ĉe malbono.

Senbranĉigita trunko proponas la samajn fruktojn, kiel tiuj produktitaj antaŭ la bato, kiu ĝin stumpigis.

La fonto atingas la riveron, dissolvante en la propran sinon la koton ĵetitan al ĝi.

Ni tenu nian koron en la viva akvo de la neelĉerpebla bono.

Ni serĉu la *bonan parton* de la kreitoj, aferoj kaj okazaĵoj, kiuj trapasas nian ĉiutagan agadon. Tiel ni havos la spegulon de nia menso turnita al la bono, asimilanta ties eternajn trezorojn, kaj la feliĉo, kiu fontas el la malavara, aganta fido, liberigos nin el la katenoj de

ĉia malbono, ĉar tiam la bono, konstanta kaj pura, estos trovinta en ni fidindan reflektan.

## 7

### Laboro

Se ni celas mense reflekti la lumon de la Superaj Spiritaj Sferoj, nepre necesas, ke nia volo spontanee alprenu laboron kiel ĉiutagan nutraĵon.

En la pasinteco ni ĝin rigardis kiel malnoblan okupon de ĉiuj falintaj sub la malhonora signo de malŝato.

Lernejo, artoj, mastrumado, industrio kaj terkulturado estis malŝate forlasataj en sklavaj manoj, dum por la ŝajne liberaj brakoj oni rezervis la orkoloran senfarecon.

Sed ni hodiaŭ scias, ke la leĝo de laboro estas vojo al justa emancipiĝo. Sen ĝi la mensa mondo dormas

senmova. Eskapi ĝiajn ordonojn estas halti margene de la vojo, kie la progreso-ĉaro antaŭeniĝas, nedeturnebla, lasante ĉe la posto ĉiujn, kiuj alkroĉiĝas al la pigro-iluzio.

Uzuristo malfeliĉas ne nur tial, ke li proprigas al si la havon destinitan al Ĉies Bono, sed ankaŭ pro tio, ke li elfosas al si mem ornampenan kavon, en kiu velkiĝos liaj plej noblaj spiritaj kapabloj.

Tamen ne valoras agi sencele.

La inferaj regionoj estas plenaj de movado.

Krom la *devo-laboro*, kiu nin tuj kompensas per pago, al ni ankaŭ estas necesa la plezuro servadi.

Ĉe la naturaj kondiĉoj de sia surtera disvolviĝo, la enkarniĝinta spirito estas devigita al senĉesa penado por subteno de la fizika korpo. Li senpage ricevas la puran akvon, la sunlumajn principojn kaj la nutrajn rimedojn de la atmosfero, sed necesas, ke li ŝvitu kaj suferu serĉe de proteino kaj karbonhidrato certigantaj al li la organan viglon.

Kvankam subigita de l' cirkonstancoj trudataj de la obskura materio, en kiu li kelkatempe spiras, tamen, ankoraŭ sur la Tero, la feliĉon de la volonta servado al la similuloj povas ĝui ĉiuj, kiuj malfermas la spegulon de sia animo al la lumo de la Dia Sfero.

La *laboro-ago* transformas la medion.

La *laboro-servado* transformas la homon.

La salajritaj taskoj konkeras la dankon de ĉiuj ricevantaj ilian bonefikon, sed ili ja apartenas al la rondo de l' ĉi-mondaj aferoj, en la kadro de la ordinaraj interŝanĝoj.

La spontanea servado, motivita de nenia kompenso, vastigas la influon de la Ĉiela Boneco, kiu ĉiujn subtenas sen ia pagpostulo.

Laŭmezure kiel nia ascendo longiĝas, ni pli klare komprenas la neceson labori pro amo al servado.

Kiam ni komencas helpi la proksimulon, ne bezonante pikilojn, tiam ni matrikuliĝas en la kurso de mempurigado, agordiĝante al la Plena Vivo.

En la pli altaj spiritaj rondoj laboro ne estas trudata. La kreito, konscianta la veron, komprenas, ke agado por la bono estas alkonformiĝo al la Leĝoj de Dio, al kiuj li memvole submetiĝis.

Ĝuste tial, en la superaj sferoj, kiu servas, antaŭeniĝas direkte al la suproj de la glora senmorteco, rebildigante en si mem la miregindaĵojn el la Ĉielo, kiu nin ĉirkaŭas kaj ĉie respeguliĝas.

## 8

### Asociiĝo

Se la homo povus propraokule rigardi la fluojn de la penso, li tuj rekonus, ke ni ĉiuj vivas en reĝimo de komuneco laŭ la principoj de altiriĝemo.

La asociiĝo troviĝas en ĉiuj aferoj, difinas ĉiujn okazaĵojn kaj regas la ekzistadon de ĉiuj estaĵoj.

Demokrito, la greka saĝulo vivinta sur la Tero longe antaŭ la Kristo, asertis, ke “la atomoj, nevideblaj al la homa okulo, grupiĝas kiel kolomboj serĉantaj manĝaĵon kaj tiel formas la korpojn de ni konatajn.”

Nuntempe ni komencas penetri la esencon de l' mikrokosmo kaj ĉiamaniere povas provizore rigardi la esploratan atomon kiel simbolean miniaturan

sunsistemon, kie la nukleo ludas la rolon de ĉefcentro kaj la elektronoj tiun de planedoj en gravita movo.

En la sfero de la Plejampleksa Vivo, ni vidas la sunojn portantaj la mondojn tra la senlimaĵo pro la elektromagneta interagado de la universaj fortoj.

Tiel same, en la ordinara vivo la animo vibras agorde al la mensaj fluoj, elsendataj de tiuj animoj similaj al ĝi.

Ni asimilas la pensojn de tiuj same pensantaj kiel ni.

Efektive, sentante, pensante, parolante aŭ agante, ni agordiĝas al la emocioj kaj ideoj de ĉiuj personoj, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, kiuj apartenas al nia simpatio-rondo.

Ni senĉese altiras aŭ forpuŝas mensajn elementojn, kiuj, agregiĝante al la niaj, fortigas nin por la bono aŭ por la malbono, laŭ la direkto, kiun ni elektis.

En ĉiu faro, en ĉiu opinio, ni ĉiam prezentas la sumon de multaj influoj.

Ni esprimas milojn da personoj, kaj miloj da personoj nin esprimas.

La deziro, levilo de nia sento, produktas, laŭ nia volo, la energion, kiun ni konsumas.

Kiam ni okupiĝas pri la neperfektaĵoj kaj eraroj de la aliaj, la spegulo de nia menso ilin tuj reflektas, kvazaŭ ensorbante ties hontigajn bildojn. Tiam nia imago

komencas digesti tiaspecan nutraĵon, kiu poste fariĝas konsistaĵo de la subtilaj histoj de nia animo. Kun la tempopaso, nia animo ne malofte komencas esprimi, per sia organo de manifestiĝo, tion, kion ĝi asimilis, ĉu per la karna korpo, inter la homoj, ĉu per la korpo spirita, post la morto.

Jen kial ordinare la kritikistoj de la aliula konduto fine faras la samajn agojn, kiujn ili kondamnas ĉe la proksimulo, ĉar, celante plendetale esplori la malbonon, ili ne konscie ensorbas ties emanaĵojn kaj iam surprize sin vidas potencataj de la fortoj, kiuj ĝin reprezentas.

Ĉia ombro-makulo en nia personeco respegulas la pli grandan ombron.

Kiel la eta infekta fokuso povas, forlasita al si mem, fariĝi en kelkaj horoj grandega, putra maso, tiel same klaĉado povas ĵeti nin en malvirton, kaj sistema kolero povas nin treni en la labirintojn de frenezo aŭ en la tenebrojn de l' krimo.

Pensante, konversacianta aŭ laborante, la forto de niaj ideoj, paroloj kaj agoj atingas en momento potencon des pli grandan, ju pli multaj estas la personoj, enkarniĝintaj aŭ ne, kiuj konsentas kun ni, kaj tiu potenco emas senĉese kreski, reciproke trudante al ni la sekvojn de niaj iniciatoj.



Ni do senĉese strebu al bono, helpante, lernante, servante, indulgante kaj amante, ĉar per tia sinteno ni reflektos la kulturantojn de lumo kaj senmanke solvos nian problemon de kompanio.

## 9

# Sugesto

Oni priparolas la fenomenon de la mensa sugesto kvazaŭ aferon ekskluzive privatan de specialaj magnetaj eksperimentejoj, rigardante hipnotigantojn kaj hipnotigitojn kiel miraklistojn.

Grasset, la eminenta neŭrologo de la Montpeliera skolo, eĉ klasas la sugestojn en du kategoriojn: - tiujn intrahipnotajn, kiuj efektiviĝas dum la nenatura dormo, kaj tiujn posthipnotajn, kiuj manifestiĝas post la vekigo.

Sed sugesto okazas ĉiumomente, en la vivo de ĉiuj homoj, surbaze de la konstanta mensa reflektio.

Ĝin la plej vigle mastras la magio, kiu, signifante la regadon de la okultaj fortoj, montriĝas

super ĉio kiel la etoso de ĉiuj religiaj ceremonioj sur la Tero, en kiuj kunagas la fortoj de potencaj mensoj, enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj, estigante okazaĵojn, kiuj impresas la popolan menson kaj disciplinas ties impulsojn.

Sugesto, tiu ja simpla kaj pura mensa forto, portanta la ideon kiel vivan bildon, estas, kiel la elektro, la eksplodaĵo, la vaporo kaj la atoma diseriĝo, nek bona nek malbona, ĉar ĝiaj efikoj dependas de la uzo, kiun oni faras el ĝi. Ni do vidas ĝin ne nur ĉe la altaro de preĝado kaj ĉe la sakralaj simboloj de la diservoj, admonantan la popolan koron al virto kaj progreso, sed ankaŭ ĉe la malnoblaj spektakloj de la barbaraj ritoj kaj ĉe la forloga demagogio elspiranta la malsuperan psikismon, kiu inspiras malĉaston kaj ribelon.

Niaj emocioj, pensoj kaj agoj estas dinamikaj sugest-elementoj.

Ĉiu homo eksterigas la mensan energion, formante subtilajn bildojn, per kiuj li influas la proksimulon, same kiel li ankaŭ estas influata de tiuj formoj elsendataj de aliulaj cerboj.

Ĉiu nia sinteno en la vivo polarizas fortojn sur tiujn afinantajn al nia esteco, ilin pelante al konscia aŭ nekonscia imitado.

Tiel okazas, ĉar kio gvidas nian agadon ĉe ĉiuj paŝoj en la vivo, tio estas la principo de reflektado.

La lernejo estas ia inicejo por la animoj komencantaj la laborojn de intelekta perfektigado, kaj samtempe ia centro de kondiĉitaj refleksoj por milionoj da spiritoj, kiuj reenkarnegas celante repreni, per la alfabeto, la laboron por siaj propraj konkeroj sur la kampo de la intelekto.

Kun la helpo de multaj instruistoj, nin gvidantaj de la katedro kaj de la tribuno, per la libro kaj la gazetaro, ni reprenas, en la mondo, nian psikan realaĵon, difinitan de la tutaĵo el niaj akiroj, emociaj kaj kulturaj, faritaj en la pasinteco, sed kun la ebleco vaste eduki la volon por la konvena alĝustigo al la Supera Vivo.

Tiamaniere ni hodiaŭ estas efektivaj heredantoj de la reflektoj de niaj hieraŭaj spertoj, disponante rimedojn por turni ties direkton al la vera feliĉo.

Helpante aliulon, ni sugestas helpon al ni mem. Humile elportante la sortovicojn de la revirtiga vojo, ni sugestas al ĉiuj ĉirkaŭ ni esti paciencaj kaj solidaraĵoj al ni mem.

Helpante, ni nin mem helpas.

Malutilante, ni malutilas nin mem.

Per la spontanea sugesto ni semas reflektojn de nia esteco kaj rikoltas ties efikojn ĉe aliulaj personecoj,

same kiel, en la mondo, ni semas kaj rikoltas kanabon kaj tritikon, karoton kaj terpomon.

Ni do mem respondas pri nia ligo kun la konstruaj fortoj de l' bono aŭ kun la renversaj fortoj de l' malbono.

## Komprenemo

La terkulturisto ne malbezonas la plugilon, per kiu li sulkos la grundon.

La statuisto utiligas la ĉizilon por konformigi la marmoron al la krea ideo flamiganta lian kapon.

La homo strebanta al estigado de mensaj reflektaj, kiuj protektu lian vojon, ne malhavos la komprenemon kiel fundamenton de la renoviga laboro: komprenemon, kiel simbolon de aktiva frateco, kaj simpation, kiu, kiel fortaltira centro, eksterigu lian plej bonan flankon, por ke la plej bona flanko de aliuloj eksteriĝu favore al li.

Ni ĉiuj nepre estas envolvitaj en la mensa ondo de ni elsendata en reĝimo de natura cirkvito.

Ni karakteriziĝas bona aŭ malbona laŭ tio, kiel ni uzas niajn sentojn kaj pensojn, kiuj esence ja estas ŝarĝoj da elektromagneta forto, per kiuj ni vundas aŭ karesas, helpas aŭ malutilas, vivigas aŭ ruinigas, kaj kiuj nepre revenas al ni mem saturitaj de la bonaj aŭ malbonaj elementoj, per kiuj ni difinis ilian direkton.

Kiam koleraĵ kaj acidhumoraj, agresemaj kaj malĝentilaj kontraŭ la aliaj, ni kreas kontraŭ ni mem, per reflektita efiko, senkuraĝecon kaj malmoderon, kruelecon kaj malvarmecon, sed kiam malavaraĵ kaj komprenemaj, komplezemaj kaj utilaj al ĉiuj el nia rondo, ni sekve kreas al ni mem ĝojon kaj trankvilon, sekurecon kaj kuraĝon.

Ĉe ĉiuj aferoj, ĉe ĉiuj kreitaĵoj, la vivo respondas al ni laŭ la naturo de nia alvoko.

Tiel longe ĝis ili atingos la Kosman Konscion, ĉiuj kreitoj distingiĝas per luma flanko, kiu ilin altigas al la suproj de la evoluo, kaj per ombra flanko, pro kiu ili ankoraŭ suferas la influon de la malantaŭo.

Eĉ la ordinara pozicio de la homo sur la Tero simbolas tiun specifan kondiĉon. Supre la plena brilego de la Suno, malsupre la mallumeco de la abismo.

Ni ĉiuj ricevas de la Ĉiela Patro stimulojn por la estonteco kaj suferas reflektajn de la pasinteco, disverŝigantajn sur nian ekzistadon.

Malligante la katenojn de l' malbono, kiujn ni mem forĝis malutile al niaj animoj, ni sekve devas strebi al la bono, senti ĝin, mense bildigi ĝin kaj ĝin konkretigi per ĉiuj fortoj al ni disponeblaj.

Por komenci, ni devas distingi krimulon disde krimado, same kiel terkulturisto diferencigas vermon de plantado, celante estingi la regadon de la unua kaj kreskigi la utilon de la dua. Kaj kiel la kamparano estingas la plagon por savi la kultivaĵon, tiel same necesas, ke nia kompreno improvizu rimedojn por helpi la proksimulon, falintan en la kaptilon de l' krimado, sed tamen ĉi tiun ne stimulan.

Malgrandiĝi por helpi, ne malsupreniĝante, estas certigi ĉies pliboniĝon, reliefigante sian propran sublimecon.

Sed nur la senlaca strebado al komprenemo povas certigi al ni la nemalhaveblan ekvilibron ĉe la memperfektiga penado, kiun ni garantiu per niaj plej bonaj revoj, ĉar nur la pura amo kapablas krei en nia menso la energion de la dia lumo, kiu el ni elsendiĝas per reflektoj de protekta renovigado.



# 11

## Lulilo

Escepte de tiuj planoj difinitaj por specialaj verkoj, laŭ kiuj Spiritoj en misio surmetas la fiziologiajn vestojn por konkretigi reflektajn de la Supera Vivo inter la homoj kaj ĉi tiujn instigi al pli alta ascendo, ĉiu nuna lulilo prezentas la forpasintan hieraŭon.

La vojo, kiun ni ekiras en iu ekzistado, estas la kontinuaĵo de la vojoj iritaj en antaŭaj ekzistadoj.

Penegas la scienca esplorado sur la Tero, studante la biologian kontinuecon.

Kromosomaj nukleoj kaj citoplasmaj vehikloj, mediaj faktoroj kaj familiaj genealogioj estas vokitaj de l' genetikistoj por la ekvaciigo de l' problemoj de la

origino kaj estas kompreneble, ke el iliaj demandoj aperu rimarkindaj rezultoj, nome tiuj koncernantaj la morfologiajn karakterojn kaj la surprizajn adaptiĝemojn.

Sed la skalpelo de la homa esplorado ĝis nun ne sukcesis transpasi la eksteran flankon de la organa strukturo. Ĝi ankoraŭ restas ĉe la ekzameno de la kompleksio kaj de la staturado, de la pigmentado kaj de la sangogrupo, rilataj al la korpa deveno, ĉar la meandroj de la psika heredeco ankoraŭ restas preskaŭ nesondeblaj por la surtera inteligenteco. Tiel estas ĉar la generaj ĉeloj, estante vivaj semoj, reproduktas niajn *konsciencajn kliŝojn* ĉe la nepalpebla proceso de la formiĝo de nova korpo.

En la utera kamero, la domina reflektado de nia memeco impresas la fetan plakon aŭ la tutajn de la generaj principoj, kiuj formas la fundamentojn de nia nova fizika instrumento, fiksante nian destinitecon por la taskoj, kiujn ni devas plenumi en la mondo dum difinita spaco da tempo. Per tiu aserto ni neniel intencas apologii ian absolutan determinismon, ĉar ja neniu povas forigi la libervolon, per kiu ni kreas la kaŭzojn de sufero aŭ de riparado en niaj destinoj, kadre de tiu relativa determinismo, laŭ kiu ni nin direktas al pli altaj formoj de emocio kaj pensado por la konkero de la absoluta libereco.

Transirinte la fizikan morton, ni revenas en la Pliampleksan Vivon kun kolekto da faroj ne ĉiam konformaj al tiuj, kiujn ni devus plenumi. En multaj okazoj, la imagoj kunportitaj el la karna ekzistado estas timindaj fantomoj, naskitaj de niaj kulpoj mem kaj kiuj, postulante rebonigon kaj elpagon, kreas, por niaj sentumoj, la turmentegan inferon kie kirle miksiĝas niaj plendoj kaj afliktoj.

Sed jen la Fidela Justeco, pro korfavoro, konsentas al ni la revenon, kiel benatan rekomencon. Ni tiel, tra la lulilo, reprenas rektan kontakton kun niaj kreditoroj kaj ŝuldantoj por la likvido de la koncernaj debetoj, kies kontoj jam estas efektive bilancitaj en la Diaj Leĝoj.

Ĉi tiel do ni ordinare renaskiĝas sur la Tero, konforme al niaj ŝuldoj aŭ bezonoj, tiucele asimilante la genan esencon de tiuj, afinantaj al nia esteco kaj kondutmaniero.

Pro tio, la problemoj de heredeco ĝenerale devenas de la al ni propraj mensaj reflektoj.

Vere iafoje abnegaciemaj koroj, kulturante la plantejon de amo per sinoferado, altiras al si malfeliĉajn korojn, provizore gardante en siaj brakoj monstrajn aberaciojn ne harmoniantajn al la alta nivelo, kiun ili jam atingis, sed tiajn esceptojn ni ŝuldas al la rezignemo,

per kiu ili igas emerĝi el la infersimilaj regionoj malnovajn korinklinojn el longe pasintaj tempoj, aplikante la dian atributon de la Karitato.

Sed laŭregule nia lulilo en la mondo estas reflektado de niaj bezonoj, pro kio koncernas ĉiun el ni dum la reenkarneigo honori ĝin per nobla laborado celanta riparon, pliboniĝon aŭ altiĝon, estante certaj pri tio, ke al tiu lulilo ni estas portitaj aŭ altiritaj laŭ la regeneraj aŭ komisi-plenumaj problemoj, kiujn ni bezonas por la reĝustigo de nia destino antaŭ la estonteco.

## 12

### Familio

Inter la homoj, la samsanga familio povas esti komprenata kiel la esenca centro de niaj reflektaj: agrablaj aŭ malagrablaj reflektaj, kiujn la pasinteco resendas al ni.

Memkompreneble ni al ĉi tio ne alkalkulas la ĉampionojn de la evoluado, kiuj, kondukite en la ordinaran medion, ĝin tuj superas, kreante mensan etoson al si esence propran kaj plenumante la renovigan programon kies portantoj ili estas.

Ni do pritraktas nian pozicion sur la ordinara batalkampo.

Ĉiu kreito estas provizore alkonformigita al la limoj de la agado, kiun li kapablas plenumi, aŭ, pli klare,

ĉiu el ni nur iom post iom transpasos la horizonton, kiun li jam atingis per siaj propraj reflektaj.

La primitivulo ne foriĝas senprezare de sia naskiĝejo sed tie ja multfoje renaskiĝas, kaj la relative civilizita homo longe restadas ĉe la rasa medio, en kiu li asimilas la necesajn spertojn tiel longe ĝis la tutaĵo de liaj akiroj rekomendos lin por novspecaj realigoj.

Jen kial, ĉe la sfero de la samsangeco, la enkarniĝinta Spirito iras renkonte al la korligoj, kiujn li mem teksis al si, konforme al tiu mensa linio karakterizanta liajn tendencojn.

Pro tio, la tiel nomata psikologia heredeco estas iasence la natura kuniĝo de spiritoj inter si afinantaj pro altiriĝemo al samaj aktivecoj kaj inklinoj.

Granda artisto aŭ eminenta heroo povas naskiĝi en sfero fremda al la sentoj, per kiuj ili elstaras. Tio estas la manifestiĝo de la genio, paciencie ellaboriĝinta en la kuro de la jarmiloj kaj transsendanta la reflektajn de sia individueco per giganta konstrulaboro.

Sed, sur la ordinaraĵoj, en la hejma templo kolektiĝas tiuj, sin respegulantaj, unuj en la aliaj.

Familio el muzikistoj pli facile akceptos en sian idaron praktikantojn de la dia arto, ĉar ofte la Spiritoj okupantaj ĉe ili, per la reenkarniĝo, la pozicion de filoj,

estas tiuj samaj amikoj, kiuj, ankoraŭ en la spirita regiono, jam stimulis ilian muzikan kleriĝon, kaj ĉiuj sin reciproke respiegulas en la kontinua aktiveco, al kiu ili sin donas tra multenombraj jarcentoj.

Samkiale skulptistoj kaj poetoj, politikistoj kaj kuracistoj, komercistoj kaj terkulturistoj preskaŭ ĉiam donas al si la manojn, unuj al aliaj, ĉe la kulto al la plej bonaj korligaj valoroj, sin reciproke kontinuigante en la familia genotipo kaj antaŭgardante por si mem, per la komuna laborado kaj laŭ la leĝo de renaskiĝo, la evoluan heredan proprajon, per kiu ili sin esprimas en la spaco kaj en la tempo.

Ankaŭ tial, laŭ la sama principo de altiriĝemo, ni vidas dipsomaniulojn kaj kleptomaniulojn, krimulojn kaj promoralajn malsanulojn naskiĝi de tiuj, kiuj al ili spirite agordiĝas per samaj difektoj kaj elprovoj, ĉar multaj malvirtiĝintaj inteligentoj alkonformiĝas al la genetika kampo de tiuj, altirantaj ilian kunecon, pro la malnoblaj sentoj aŭ bedaŭrindaj faroj, per kiuj ili ŝuldiĝis kontraŭ la Leĝo.

La familia morala difekto do rezultas el ŝuldo-kuniĝo kaj nin lokas en la genetika sfero, kiun ni meritas laŭ niaj ŝuldiĝoj kontraŭ la mondo kaj la vivo. Tiakaŭze ni estas devigitaj sperti la refrapon de niaj toksaj reflektoj

tra iuj anoj de nia paren caro, kiuj al ni resendas tiujn reflektajn pere de afliktaj procesoj de suferado.

Ni do renkontas en la hejma grupo ne nur tiujn ligilojn el nobleco kaj ĝojo, kiujn ni jam sukcesis teksti per amo laŭdinde praktikata, sed ankaŭ la katenojn el honto kaj antipatio, per kiuj ni rikoltas la maltrankviligajn *klišojn*, kiujn ni mem stampis sur la *memoro de l' destino* kaj kiujn ni bezonas estingi per laboro kaj sinofero, pacienco kaj humileco, nome novaj rimedoj, per kiuj ni estigos novajn spiritajn reflektajn povantajn nuligi la efikojn de nia pasinta, tumulta kaj malfeliĉa konduto.



## 13

### Filoj

Naskiĝas la infano, portante kun si la moralan heredaĵon, kiu, jam antaŭ la renaskiĝo en la fizika regiono, karakterizas lian memecon. Li tamen ricevos la reflektajn de la gepatroj kaj instruistoj, kiuj stampas sur lia nova cerba aparato la imagojn lin multfoje influantajn dum la tuta ekzistado.

Sendube lian spiriton atendas, en nova etapo, la instruado, kiu riĉigos lian iradon direkte al tiu aŭ tiu alia celo. Sed gravas konsideri, ke la vorto skribita, kompare kun tiu parolata aŭ kun la senpera ekzemplo, havas malpli fortan reflekt-potencon, precipe se katenita inter la gramatikaj konvencioj.

Tiel okazas, ĉar la voĉo kaj la agado estas saturitaj de indukta magnetismo, kiu efikas per tuja reflektado, kaj pro tio ili estigas signifoplenajn transformiĝojn, por la bono aŭ por la malbono, laŭ la naturo de tiuj, per kiuj ili manifestiĝas.

La infanoj, konfiditaj sur la Tero al nia prizorgado, portas neŭrocerban aparaton tute novan laŭ ties organa strukturo, similan al fotografilo laŭcele preparita por registri impresojn. La objektivo, kiu en tiaspeca aparato konsistas el sistemo de adekvataj lensoj kapablaj kapti ĝustajn bildojn sur sentivaj elementoj, estas figurata, ĉe la infana menso, de ia renovigita spegulo, en kiu kune funkcias vido kaj observado, atento kaj pripensado kiel lensoj de la animo, kiu ensorbis la reflektadojn de la ĝin ĉirkaŭantaj mensoj kaj ilin fiksas en si mem kiel bazajn elementojn de konduto.

La infanoj do troviĝas sub rekta efiko de spirita muldado fare de tiuj, kiuj por ili preparas la lulilon aŭ al ili certigas la lernejon, simile al viva, malfortika argilo rilate al la ideoj de la argilaĵisto.

Ni do ne povas forgesi, ke, sur la Tero, niaj filoj, kvankam portante kun si la sedimenton el pasintaj spertoj dum antaŭaj migradoj sur la fiziologia kampo, estas tamen kamaradoj, kiuj dumtempe revenas por denova

kunvivado, preskaŭ ĉiam celante kune kun ni reĝustiĝi laŭ la imperativoj de la Dia Leĝo kaj bezonante, kiel ankaŭ ni mem, elprovojn kaj instruojn koncerne al la klopodoj por la dezirata regeneriĝo.

Escepte de tiuj animoj transcendantaj niajn evoluajn markŝtonojn pro sia aparta misio plibonigi la ordinaran socian scenejon, ĉiuj ceteraj ricevas la efikon de niaj reflektaj, asimilante impresojn, kiuj longdaŭre enradikiĝas kaj iafaĵe akompanas ilin ekde la infanaĝo ĝis la morto de la fizika korpo.

Trakti ilin kiel ornamaĵojn de la koro signifas ilin konduki al pereigaj eraroj, ĉar, nekapabliĝante por la elaĉeta lukto dum la disvolviĝo de sia organa envolvajo, ili facile alkonformiĝas al la superreganta reflektaj de la inteligentaj kutimiĝintaj al la ombro aŭ al ribelemo, pro kio ili gravitas al la influo de la plej evitinda kaj timinda pasinteco.

Ĉiu infano do, konfidita al nia prizorgo, estas viva vazo rikoltanta la bildojn de nia ĉiutaga sperto. Pro tio koncernas nin la devo lernigi al ili nociojn pri justeco kaj laboro, frateco kaj ordo, ilin frue kutimigante, per la forto de nia ekzemplado, al disciplino kaj praktikado de bono, tamen sen forpreni de ili la spiriton de optimismo kaj espero. Akceptante ĝin kun amo, ni devas memori,

ke la infana koro estas altvalora urno konservonta niajn reflektojn, ia trofeo nin respegulonta en la granda estonteco, en kiu ni ĉiuj ankaŭ vivos kiel heredontoj de niaj propraj verkoj.

## 14

### Korpo

Detenante nin de ĉia scienca pritrakto, ĉar la teknikaj libroj por la ordinara instruado sufiĉe klerigas pri tio koncernanta la eksterajn aspektojn de la homa korpo, ni memorigu, ke la Spirito, loĝanto en la fizika domo, konscie aŭ nekonscie direktas ĝian formadon kaj subtenadon ekde la unua momento de la feta organiziĝo, kvankam tio preskaŭ ĉiam okazas sub la protekta zorgo de la Kurieroj de la Dia Providenco.

Portante kun si la ĉiomon de siaj bonaj kaj malbonaj reflektoj, laŭ la rikolto de meritoj kaj malmeritoj per kiuj li mem prisemis la grundon de l' tempo, la Spirito alproprigas al la reduktita muldilo de

sia esto la ĉelojn de la karna ekipaĵo, ilin alligante al sia vivo ekde la genera veziketo.

Ŝirmita en la patrino sino, lia korpo strukturiĝas per tiuj ĉeloj, kiuj, multobliĝante ĉirkaŭ la spirita matrico, kiel ferfajlaĵo sur magneto, komence formas la blastodermajn tavolojn, de kiuj originas la intesta tubo, la nerva tubo, la haŭta histo, la ostoj, muskoloj kaj angioj.

Baldaŭ, per spontanea disvolviĝo, la Spirito materiĝas sur la fizika areno, manifestiĝante per la lin individuiganta karna portilo. Tiu portilo, konsistanta el miliardoj da ĉeloj aŭ mikroskopaj unuaĵoj, kiuj alĝustiĝas al la subtilaj histoj de la animo kun ties sama elektromagneta naturo, similas kompleksan fabrikan, konsistantan el miliardoj da infinitezimaj motoroj, movataj de elektromagneta oscilado kun specifa ondolongo, elsendantaj proprajn radiojn kaj asimilantaj la radiojn de la sferoj, en kiuj ili troviĝas, sub la komando de unu sola direktanto, nome la menso.

Ekde la embria fazo de l' instrumento, per kiu li manifestiĝos en la mondo, la Spirito stampas sur ĝi siajn proprajn reflektajn.

Ekzistas estuloj tiel perturbataj en la transtomba regiono pro la malfacilaĵoj rezultantaj el sinmortigo, murdo, krimado kaj malvirtiĝo, ke, renaskiĝante, ili tuj elmontras

plej dolorajn malordiĝojn, pro la vibra misfunkcio, kiu ilin alkalkulas al la kadro de ĉeldevena patologio.

La denaskaj malsanoj estas nenio alia ol reflektoj de la malfeliĉa pozicio, en kiun ni falis en proksima pasinteco kaj kiu postulis nian interniĝon en la fizika sfero, iafoje dum mallonga tempo, por kuracado de la interna malordo karakterizanta nian kompromitiĝon.

Diversas tamen la reflektoj de la pasinteco sur la korpo. Amaraj kaŭzoj de mutiloj kaj malsanoj nestas en la profundo de nia spirita kampo, kiel semoj de agresiva dornejo de ni mem iam kultivata sur la obskura grundo de maskita kulpo kaj kaŝitaj rimorsoj. Tio estas plantado por rikolto en difinita tempo, kiun la leĝo pri kaŭzo kaj efiko vigle, firme kaj precize direktas.

Ĝuste tial, laŭ planoj difinitaj antaŭ la naskiĝo, en la kadro de ŝuldoj kaj koncernaj elpagoj, la homo estas trafita, en plena materiala prospero, de strangaj elprovoj, aŭ, kiam pli fortika montriĝas lia sano, de fiziologiaj akcidentoj kun kortuŝa aspekto.

Estas tamen necese memori, ke reflektoj estigas reflektojn, kaj ke ne estas elpago sen justaj malgravigoj, kiam la ŝuldanto volantas likvidi siajn debetojn.

La farado de bono, simpla kaj senlaca, povas ŝanĝi la linion de la destino tial, ke la klara kaj rekta pensado,

kune kun la agado, influas tiel la ĉelajn funkciojn kiel ankaŭ la homajn okazojn, altirante al ni, per nia plibonigita kaj pli nobla reflektado, subtenon, lumon kaj apogon, laŭ la leĝo pri helpo.



## 15

### Sano

Sano similas la staton de loĝejo, malkaŝanta la kondiĉojn de ties loĝanto, aŭ de instrumento, elmontranta en si mem la zorgon aŭ la malzorgon de ties uzanto.

La farita kulpo estigas en nia menso ian perturbon, al kiu aldoniĝas ne nur la senbridaj efikoj de nia pento sed ankaŭ la ondoj de malĝojo kaj akuzo elsendataj de la viktimo kaj de ĉiuj kunsentantaj al li, pro kio la centrojn de la animo potencas vastproportciaj malordoj, trafantaj la fizikan korpon mem.

Tiaspeca perturbo, prezentante diversajn gradojn, kaŭzas ankaŭ diversajn funkciajn lezojn.

Kolero kaj malespero, kruelo kaj malmodero kreas en la organismo malsanecajn regionojn de specifa naturo, trudante al la ĉeloj tiun mistonion, pro kiu nuliĝas preskaŭ ĉiuj defendrimedoj kaj malfermiĝas fekunda tereno al kulturo de patogenaj mikroboj ĉe la organoj malpli kapablaj por rezistado.

Ĝuste tial tuberkulozo kaj kancero, lepro kaj ulcero multfoje aperas kiel flanka fenomeno, dum ilia primara kaŭzo sidas en la perturbitaj reflektaj de la interna vivo.

Ĉiuj simptomoj de la mensa deprimiteco afekcias la ĉelojn en mitozo, estigante diserigajn faktorojn.

Aliflanke, gravas kompreni, ke malzorgo ĉe nutrado trudas al la korpo pezajn sufertributojn.

Dum ni restas en la karno estas nature, ke la infinitezimaj vivoj konsistigantaj nian porvivan portilon respegulu la substancojn, kiujn ni ingestas. Ĉe tiu konstanta interŝanĝa procezo ni enlasas grandegan kvanton da patogenaj bakterioj, kiuj, senpene enloĝiĝante en la ĉela mondo, povas kaŭzi diverskarakterajn infekto-malsanojn kaj tiel devigi nin returne rikolti la rezultojn de nia neantaŭzorgemo.

Sed ne nur tie, nome en la kampo de la videblaj kaŭzoj, originas la multformaj patologiaj procezoj.

Niaj plej profundaj, malsanecaj emocioj, kiaj ajn ili estas, naskas malbonfartajn statojn.

La reflektoj de niaj malnoblaj sentoj, transformiĝinte en mensajn ondojn, revenas al ni kaj perturbas la funkciadon de la nervaj ĉeloj, kiuj, dissemiĝinte en la haŭto, visceroj, medolo kaj cerba trunko, plenumas plej kompleksajn teknikajn funkciojn; emfazindas ankaŭ, ke tiuj reflektoj, disverŝiĝinte sur la encefalan kortekson, estigas halucinojn variantajn inter kaŝa fobio kaj evidenta frenezo, per kiuj halucinoj la reflektoj de tiuj enkarniĝintoj aŭ elkarniĝintoj, agordiĝemaj al nia maniero konduki kaj esti, nin atingas per rektaj aŭ nerektaj pereigaj sugestoj, tiel nin kondukante al bedaŭrindaj manifestiĝoj de mensa alieneco, en la kadro de la ordinara obsedo, malgraŭ ke ni, ĉe la kampo de la eksterajoj, povas aspekti kiel spirite sanaj personoj.

Ni do ne forgesu, ke nur la nobla sento povas produkti la noblan pensadon, sen kiuj la animo malsaniĝas pro manko de interna ekvilibro kaj stampas en la somata aparato konsekvencajn psikomaniojn kaj perturbojn.

## 16

### Alvokiĝo

La alvokiĝo estas la sumo de la reflektoj el la sperto, kiun ni kunportas el aliaj ekzistadoj.

Estas kompreneble, ke ni multfoje rangas kiel komencanto en tiu aŭ tiu alia servofako, ĉe la progreso de la laborteknikoj, kiuj ĉiam postulas novajn agadmanierojn. Sed ordinaro ni ekde la lulilo reprenas la antaŭe iritan vojon, ĉu por daŭrigi difinitan verkon, ĉu por reĝustigi tiun iradon mem.

Kiel ajn tamen, ĉiuokaze la profesia titolo signifas kreditleteron, per kiu ni estigu noblajn reflektojn.

Administranto, juĝisto, instruisto, kuracisto, artisto, maristo, manlaboristo kaj terkulturisto estas

perfekte figuritaj en tiu parabolo de la talantoj, per kiu la Dia Majstro invitas nin taksi nian propran respondecon antaŭ la pruntoj de la Senlima Boneco.

Ĉiu Spirito ricevas, en la sfero kie li troviĝas, certan kvanton da rimedoj por honori kaj glori la Dian Verkon. Sed, en la plimulto de la okazoj, ni senrajte proprigas al ni la donojn de la Sinjoro, ilin uzante por la bedaŭrinda kontentigo de niaj senbridaj pasioj, kun la freneza celo spiti Dion mem.

El tio fontas la amaraj rikoltoj de nia konduto, kiam, pro la eluziĝo de la surtera korpo, ni estas devigitaj al dolora reveno al la malfacilaĵoj de la rekomenco, ĉe kiu la evolu-reĝimo de la reenkariniĝo funkcias per preciza valortaksado.

Kaj ĉar ĉiu profesia kampo ampleksas diversajn fakojn de aktiveco, la juĝisto kiu naskis reflektajn de krueleco, persekutante senkulpulojn, ofte revenas al tiu sama tribunalo, kie li plenumis siajn pompajn funkciojn, verŝante larmojn de maljuste kondamnita akuzito, por suferi en la spirito kaj en la karno la turmentojn, kiujn li iam trudis al sendefendaj viktimoj.

La kuracisto, kiu misuzis la al li konsentitajn eblecojn, revenas al la hospitalo, kiun li malhonoris, kiel obskura flegisto, luktante kontraŭ aspraj malfacilaĵoj por

gajni sian vivtenon. La granda bienulo, kiu forkonsumis la energiojn de la humilaj kunlaborantoj al li donitaj de la Ĉielo por la kampkulturado, venas returne al la terpeco, kiun li malnoble ekspluatis, kiel malriĉa laborulo, suferante tiun saman laborreĝimon, per kiu li morale katenis aliulajn esperojn.

Eminentaj artistoj, kiuj el la inteligento faris alirejon al hontegindaj malbonmoraĵoj, reaperas kiel senfamaj kunlaborantoj ĉe pentrejoj kaj scenejoj, portante longajn nerebonigeblajn inhibiciojn simile al lertaj, lastrangaj laboristoj. Virinoj distingitaj de honorindaj nomoj, sed kiuj sin donis al malĉastado kaj diboĉo, forgesante la noblajn devojn koncernantajn ilian ekzistadon, ofte revenas al tiuj hejmoj, kiujn ili hontigis, en la karaktero de obskuraj servistinoj, kaj en kiuj ili penege lernas rekonkeri la respektigindajn titolojn de edzino kaj patrino...

Kaj reveninte, ili ofte renkontas ĉe ĉiu paŝo malŝaton kaj malamikemon, obstaklojn kaj ĉagrenojn, spertante sublimajn aspirojn kaj amarajn frustraciojn, ĉar estas laŭ la Leĝo, ke ni nepre rikoltu la reflektajn de niaj propraj agoj, plantitajn en aliulaj animoj, kaj tiel rebonigu en ni mem la fonton de la emocio kaj de la ideo, por ke ni revenu al la fluo de l' bono, kiu, deirante de Dio, trakuras la tutan Universon kaj al Dio revenas.

## Profesio

Per la profesiaj kontaktoj la homo kreas vastan laborlernejon, konstruante la homan dignon; sed per la abnegacio li elsendas reflektajn de la dia beleco, malfermante novajn vojojn al la Ĉiela Regno.

La honeste praktikata profesio, malgraŭ sia pagkompensa reĝimo, inklinitas la homojn al devokulto.

La abnegacio, kiu estas sinofero por aliula feliĉo, sublimigas la spiriton.

Ĝuste tial ĉiuj popoloj sentas la neceson starigi, plejprofunde en sia sino, konstantan altaron, sur kiu ili faru honoron al siaj veraj herooj.

La abnegacio, kiu komenciĝas ĉe la punkto, kie la devo finiĝas, ebligas la reflektan de la Supera Spirita Sfero sur la kampo de la homaro.

La ordinara deliktulo, malliberigita en karcero, inspiras kompaton kaj suferon. La ĉampiono de nobla afero, maljuste enfermita en tiu sama loko, estigas respekton kaj imitemon.

La konsienca kaj amika administranto, kiu distribuas la bonojn de la servado, uzante sian parton kun skrupula honesteco, estas modelo de surteraj virtoj. La homo, kiu donas sian ŝviton kaj sangon por la bono de ĉiuj, ne zorgante pri siaj interesoj, estas apostolo de la ĉielaj virtoj.

La vartistino, juste kompensita por sia servado ĉe la infano kiu ricevas ŝian kareson, ja meritas konsideron kaj dankon, sed la patrina koro, en konstanta abnegacio, ravas siajn rigardantojn per la gloro de la pura amo.

Ja tial la matematikisto, ricevante la laŭrojn de la publika estimo kaj la indan pagon por sia verko, estas nomata scienculo, dum la scienculo, droninta en senĉesa laborado por la trankvileco kaj sekureco de la civilizacio kaj forgesinta pri si mem, estas klasigita kiel bonfaranto.



Per la fidela plenumo de siaj devoj, la homo sin mem plibonigas, kaj per la abnegacio la anĝelo proksimiĝas al la renoviĝinta homo, perfektigante la vivon kaj la mondon.

Sur la aktivecojn transcendantajn la kadrojn de la surteraj salajrataj servoj kaj rezultantajn el la agado de animoj, kiuj transpasis la impulson por konservado de sia propra komforto, falas la mensaj reflektoj de la Ĉielaj Inteligentoj, kiuj pro amo laboras sur la kampoj de la kaŝita bonfarado, en kiuj kampoj ni trovas la eternajn brakojn de la Nekonebla Diaĵo, nome Dio.

En tiu morala regiono de senlima abnegacio, en kiu ni trovas ĉiujn homajn korojn sin dediĉantajn al la volonta bonfara servado, ne ĉiam vivas la genio iafoje premata de angoro pro la sumo de la bedaŭrindaj reflektoj, kiujn li kunportas ekde malproksima pasinteco. Sed tie nepre troveblas la noblaj sacerdotoj de ĉiuj religioj, la admirindaj artistoj de ĉiuj patrioj, la noblaj inventistoj de ĉiuj regionoj, la kleraj metiistoj de ĉiuj popoloj kaj la grandaj patrinoj, multfoje forgesitaj kaj suferantaj, de ĉiuj latitudoj. Per ili ĉiuj la Supera Spiritita Mondo iom post iom descendas en la homan sferon, havante

nenian ligon kun tributoj de populareco aŭ monkompensoj, ĉar ĝuste en tiu kampo, helpante aliulojn pro absoluta rezigno al siaj interesoj, la animo vivas la subliman apostoladon de la sanktiga abnegacio, altirante la Dian Penson cele al la plibonigo kaj la progreso de la homaro.

## 18

### Socio

La homan scion oni povas similigi al vastega arbaro el mensaj kreaĵoj, kie ĉiu spirito, en proceso de evoluado kaj elpuriĝo, renkontas siajn proprajn reflektajn.

En ĝi, la principoj de ago kaj reago funkcias kun precizeco.

La patrioj, grandaj matricoj de progreso, konsistigas gravajn subtenilojn al la civilizacio aŭ signifoplenajn laborejojn, kie multnombraj grupoj da animoj daŭre klopodas ĉe memedukaj laboroj, per servado al la komunumo, sed ankaŭ multfoje elmigras en aliajn landojn laŭ sia bezono fari tiun aŭ tiun alian akiron sur la kampo de la sperto.

La kolektiva hejmo, difinante raciajn altiriĝemojn kaj klanajn interesojn, prezentas la kolekton de la emocioj kaj pensoj de siaj loĝantoj. Inter la vibraj limoj ĝin karakterizantaj, pere de la mallongaj kursoj kun “*lulil-tomba*” daŭro, kiujn ni nomas *surteraj ekzistadoj*, la animo ŝanĝas siajn poziciojn laŭ la reflektoj, kiujn ĝi el si mem sendis, kaj laŭ tiuj, kiujn ĝi asimilis el la medio, kie ĝi faris sian staĝon.

Veninte al la tempo por taksado de niaj valoroj, kiam pro la fizika morto estingiĝas la korpa vivoforto, pruntita al la spirito por la enkarna vojaĝo celanta disvolviĝon kaj servadon, reboniĝon aŭ altiĝon, ni rikoltas la fruktojn de nia konduto, kaj ofte al ni estas necese rekomenci la laboron por reĝustigi sintenojn kaj purigi sentojn, ĉe la rekonstruado de nia destino.

Tiel do la homoj hodiaŭ premegantaj la proksimulon per la socia altrangeco, en kiu ili tronas, ĉe la trompa superregado de mono, morgaŭ devas reveni al la turmentega kampo de senhaveco kaj malfeliĉo, rikoltante, sub rektaj trafaj, la radiojn de la suferado, kiujn ili semis en la grundo de la aliulaj bezonoj. Kaj se viktimoj kaj turmentantoj ne inklinas al larĝa praktikado de reciproka pardono, tiam ekestas en la socia mondo vera senelira rondo, en kiu konstante interfrapiĝas ondoj

da venĝado kaj malamo, disputado kaj krimo, kiuj ja subtenas favoran terenon por deliktado.

Socioj, kiuj hieraŭ sklavigis la homan forton, estas hodiaŭ devigitaj protekti, kiel filojn el la propra sino, tiujn, kiujn ili forŝiris el la lando tiam servanta kiel ties evoluejo. Invadantaj hordoj, kiuj ruinigas la agrojn de humilaj, sendefendaj popoloj, inter ĉi tiuj renaskiĝas, kiel idoj de la konkerita teritorio, por helpi la rekonstruadon de la institucioj, kiujn ili batis aŭ disrabis. Apartigaj grupoj, kiuj humiligas fratojn pro ties haŭtkoloro, revenas kun la malamata pigmento, rikoltante la reefikon de siaj propraj verkoj. Aristokrataj urbanoj, nesentemaj por la problemoj de la obskuraj klasoj, ĝuinte la komforton de luksegaj avenuoj, ordinaro renaskiĝas en senfamaj, problem-riĉaj kvartaloj, por trinki, el la kaliko de paŭperismo, la reflektajn de tiu ridanta krueleco, kun kiu ili iam rigardis la doloron kaj la malfacilaĵojn de la idoj de l' sufero.

En ĉiuj epokoj, la homa socio estas tiu giganta filtrilo de la spirito, en kiu la animoj, sur la vojoj de la sperto, ĉe bonhavo aŭ mizero, direktado aŭ subalterneco, rikoltas la fruktojn de la propra plantado, malrapidigante siajn paŝojn ĉe la ordinareco de la ebenaĵo aŭ ilin akcelante direkte al la vivosuproj, obee al la ordonoj de la progreso.

## 19

### Prospero

Prospero sur la Tero signifas riĉecon, feliĉon.

La plejparto el la homoj, aspirante al ĝia posedo, deziras elstarecon, aŭtoritaton, superregadon...

Oni foruzas multegajn bonojn de la vivo por akiri ĝian prestiĝon, kaj por ĝin elbatali ne mankas tiuj, kiuj sondas la okultajn elementojn, celante altiri ĝian favoron.

Milionoj da homoj nuntempe vivas serĉe de oro kaj superregado tiel klopodeme kiel, en la antikveco, kadre de pli simplaj lernadoj, oni sin donis al la primitivaj okupoj pri ĉaso kaj fiŝkaptado.

Tiel okazas, ĉar, strebante al tiu aŭ tiu alia valoro de la vivo, ni agigas la mensan energion, kiu konsistas el niaj emocioj kaj deziroj.

La spegulo de la koro, en konstanta turniĝado al la objektoj kaj situacioj, kiujn ni serĉas, altiras sur nian vojon tiujn elementojn, kiuj okupas nian animon.

Ni tamen ne forgesu, ke, dum nia penega irado direkte al la Dia Gloro, ni ĉiam identiĝas kun tio reganta nian atenton, restante ĉe tiu aŭ tiu alia kampo de agado laŭ la intenseco kaj daŭro de nia celado.

Kiel ĉe la kinematografa filmo, kie la historio estas rakontata per seninterrompe sinsekvantaj bildoj, tiel same nia sperto, en tiu aŭ tiu alia etapo de nia vivo, konsistas el la ripetigantaj reflektoj de niaj sentoj, kiuj reflektoj senhalte naskas ideojn, kies efiko estas difini la temojn de nia vivo, al kiuj nia menso aliĝas, preskaŭ absolute identiĝante kun siaj propraj kreaĵoj, simile al la testudo, kiu sin ŝirmas kaj izoliĝas en sia propra karapaco.

Pro tio, en la mondo ĉiam ankoraŭ diskutblas la koncepto pri prospero, ĉar ne ĉiuj scias posedi, rangaltiĝi aŭ estri profite al la sanktegaj celoj de la Kreado.

Multaj homoj, per la senĉesa mensa reflektado ĉe la monaj havaĵoj, progresas laŭ materialaj rimedoj; sed ne transformante tiujn rimedojn en faktorojn de ĝenerala progreso, ili elfosas al si orajn abismojn, en kiujn ili sin ĵetas, uzante longan tempon por de si forskui la verdigran

de la monavido. Multego da homoj, en ĉiu jarcento, plugante la vivgrundon kun konstanta strebo al individua elstareco, akiras vastan renomon en scienco kaj religio, en beletro kaj artoj; sed se ili ne agigas siajn konkerojn por la protekto kaj la edukado de siaj kunuloj sur la homaj vojoj, ili preskaŭ ĉiam, kvankam brilegante en la geniulgalerioj, suferas la refrapon de siaj ekstravagancaj menso-ondoj kaj falas en danĝerajn elpurig-labirintojn.

Jen kial estas multe da prospero ŝajna, ja pli bedaŭrinda ol la materiala mizero mem, ĉar se la malplena tablo kaj la senfajra forno povas prezenti vojon al beninda riparado, tamen la manĝoriĉaj bankedoj kaj la plenaj kasoj ofte fariĝas avenuoj de diboĉo, kondukantaj en la abismon de kulpo, de kiu ni eliros nur post longaj restadoj en konsterno kaj ombro.

Multaj religiuloj demandas, kiakaŭze Dio protektas la materialan progreson de malpiuloj. Vere, tia fortuna ne ekzistas, ĉar prospero sen honesta konduto estas nenio alia ol senrajta alproprigo, ia kvazaŭa brila vestaĵo kovranta kaŝajn ulcerojn. Tiuj ulceroj postulas la ekeston de reflektoj kontraŭaj al la eraroj, kiuj ilin naskis, por ke la vera prospero, kies esprimo estas servado kaj kulturo, amo kaj honesteco, havigu al la spirito dominan lumreflekton.



## Kutimo

Kutimo estas ia vico da akumuliĝintaj mensaj reflektoj, efikantaj per konstanta instigo al rutino.

Heredantoj de la jarmiloj, kiujn ni konsumis en refarado de multaj inter si analogaj spertoj, ni ĝis nun vivis preskaŭ simile al barkoj flupelataj en la rivero el kutimoj, al kiuj ni senreziste alkonformiĝis.

Kun naturaj esceptoj, ni ĉiuj akiris la kutimon konsumi, per aŭtomata reflekto, la aliulajn pensojn, kio igis nin troigi niajn bezonojn kaj apartiĝi de simpleco, per kiu ni ja facile konstruus al ni pli bonan vivon. Ĉirkaŭ tiuj bezonoj ni starigis tutan defendan sistemon surbaze de krueleco, per kiu ni vundis la proksimulon kaj konsekvence nin mem disŝiris.

Tiamaniere ni strukturis komplikan mekanismon el antaŭzorgo kaj malkonfido, translime de justa singardo, pasie konservante la instinkton de posedo. Per ĉi tiu instinkto ni kreis la reflektajn de egoismo kaj orgojlo, vantamo kaj timo, sub kies regado ni vane provis eskapi el la Diaj Leĝoj, irante, en la plimulto de la cirkonstancoj, kvazaŭ senatentaj, malfidelaj laboristoj, kiuj forlasas la altvaloran maŝinon, ĉe kiu ili devus fari gloran servadon, por fali, senspiraj aŭ maltrankvilaj, en ties dentradoarojn mem.

Ĉe tiu senelira rondo, la homo ordinare vivas sub la potenco de volonta nesciado, sin mem trompante depost la lulilo por elreviĝi transtombe, enfermita en la binomo iluziigo-seniluziigo, kie li restas longajn jarcentojn, komencante kaj rekomencante la vojon, sur kiu li nepre devas antaŭeniri.

Neniel tamen pravigeblus malŝati la konstruan rutinon, ĉar ja per ĝi la estaĵo leviĝas en la spaco kaj en la tempo, konkerante la rimedojn, kiuj nobligas al li la vivon.

Sed la evoluo ja trudas novajn kutimojn, celante, ke ni dekroĉiĝu de la malsuperaj formuloj kaj strebu pli altajn ciklojn de la ekzistado.

Jen kial ni rigardas en la Kristo - dia mejloŝtono de la homa renoviĝo - tutan programon de profunda

transformiĝoj por la spirito. Sen ia ajn perforto, li ŝanĝas la regulojn de la *moral a modo*, en kiu la Tero vivadis de antaŭ pluraj jarmiloj. Kontraŭ la uzo de la sistema kondamno, li proponas la praktikadon de pardono. Antaŭ la rasa tradicio li kontraŭmetas la veran fratecon. Ĉe la forlasiteco de l' malĝojo kaj senkuraĝo, en la krizaj horoj, li portas la novaĵon pri la eternaj feliĉoj rezervitaj al la afliktitoj, kiuj scias esperi, kaj al la justuloj, kiuj scias suferi.

La tuta apostola irado de Jesuo inter la homoj, ekde la Staltrogo, kiu starigas la kutimon de simpleco, ĝis la malhonorega kruco, kiu estigas la kutimon de sereneco kaj pacienco kun la certeco pri la releviĝo en la eternan vivon, estas splenda vico da reflektoj el la ĉiela vojo por la elaĉeto de la surtera homaro.

Ĝis nun, en la mondo, nia justeco spiras venĝon kaj nia amo gustas egoismon pro la kondiĉita reflektado de niaj senpripensaj agoj dum la jarmiloj antaŭintaj nian "hodiaŭon". Ni tamen ne povas ignori, ke nur adoptante bonkorecon kaj komprenemon, ĉe la nepra devo edukiĝi kaj servadi, kiel aŭtomatajn kutimojn por la travivado de ĉiu tago, krom ankaŭ kunlaborante por ĉies sekureco kaj feliĉo eĉ koste de sinofero, ni reflektos en ni mem la veran feliĉon kiel rezulton de nia strebado al la vera bono.

## 21

### Devo

Devo signifas nian submetiĝon al certaj principoj, kiujn la Dia Saĝo starigis kiel leĝojn por la disvolviĝo de niaj kapabloj.

Por vivi sekure, neniuj povas malŝati disciplinon.

Obeas la elementaj partikloj de la atoma mondo, ankaŭ obeas la konstelacioj en la glora Senlimo.

La homo ne vojaĝos tra la firmamento, tre malproksime de la hejma regiono, al kiu ligiĝas lia fizika korpo, se li ne obeos la principojn regantajn la movojn de la maŝino, kiu lin transportos.

Oni tiel povas simbole prezenti la devon kiel la zonon de agado por la bono, kiun la Superega Sinjoro

strekis al nia respondeco, por subtenado de la ordo kaj de la evoluo en Lia Dia Verko, cele al nia perfektigo.

Ĉiun konsciencon, lumigitan de la suno de l' racio, oni do rigardu kiel radion en la sfero de la vivo evoluantan de la supraĵo al la centro, kaj al kiu koncernas la devo respekti kaj impulsi, faciligi kaj subteni la komunan bonon. Tiu spontana sintenado altiros al ĝi la naturan helpon de ĉiuj, kiuj de ĝi ricevas simpation kaj kunlaboron. Ja per tia sintenado ĉiu spirito konkretigas ĉie, kie li pasas, la reflektajn de si mem, sin malfermantajn al la reflektajn de pli progresintaj mensoj, kiuj lin pelas al kontemplado de pli vastaj horizontoj de la progreso kaj al adekvata asimilado de pli altaj valoroj de la vivo.

Tiamaniere, per plenumado de la devo - morala regiono de servado, en kiu ni estas konstante admonataj de la konscienco - ni eksterigas nian pli bonan parton, rikoltante la pli bonan parton de la aliuloj.

Sed okazas, ke ni multfoje estigas perturbojn en la aktivecoj al ni konfiditaj de la Sinjoro. Tiam ni ne nur difektas nian ekzistadon sed ankaŭ malordigas multajn aliajn ekzistadojn, malaranĝante multe da aliaj pecoj en la maŝino de l' destino.

Tiaokaze leviĝas kontraŭ ni la neelpetebla trudo al pli akra lukto, kiun ni povas nomi regener-devo, laŭ

kiu ni estas devigitaj naski reflektajn, kiuj tute renovigu nian memon antaŭ tiuj fariĝintaj kreditoroj de nia sinofero.

Tio klarigas, kial ni ricevas, pro trudo de la cirkonstancoj, nekompreneman edzinon, kolereman edzon, malsanan filon, agreseman ĉefon, probleman subulon, necedeman malsanon aŭ devigan taskon por servado al aliaj, kiel spiritan laborkampon, sur kiu ni intense penadu por nia propra reboniĝo.

Kaj ja tiakaŭze neniom valoras dizerti el la kampo de akraj devoj, kie ni devas resti pro la premo de la ordinaraj okazaĵoj de la vivovojo, ĉar en la fundo de la konscienco, eĉ se aliula konsidero nin liberigas de tiu aŭ tiu alia tributo el memofero kaj rezigno, la prudento ordonas, ke ni streĉe atentu la verkon de pacienco kaj toleremo, humileco kaj amo, kiun ni estis intime vokitaj entrepreni; ne tiel agante, ni, malgraŭ la ŝajna justeco de nia forkuro el la lukto, estas neelpeteble ŝarĝitaj per sekretaj sentoj de bedaŭro pri niaj malfortaĵoj, kiuj, komencante de nedaŭraj kaj malfortaj deprimoj, fine internigas nian spiriton en la regionojn de la malsano aŭ en la foson de la frustracio.

## Kulpo

Kiam ni deflankiĝas de la devo, ni falas en kulposenton, fonton de rimorso, kiu, laŭ siaj multoblaj esprimoj, malfermas ombrobreĉojn en la subtilaj histoj de la animo.

Kaj la pento, senĉese plifortigata de la reflektaj el nia amara memorado, transformiĝas en mensan absceson, nin iom post iom venenante kaj ĉirkaŭen elverŝante la miasman fluon de nia intima vivo, kiu toksas la spiritan spiron de niaj kunvivantoj.

Simile al la magneto, posedanta sian specifan kampon, ĉiu homo kunportas haloon, aŭ aŭron, el kreivaj aŭ el detruaj fortoj difinantaj lian karakteron ĉe la fasko

da nevideblaj radioj, kiujn li elsendas el si mem. Per tiu haloo ni starigas niajn nevideblajn ligojn sur la kampoj de la afineco.

Ĉar la mensa ondo agas en fermita cirkvito, ni per ĝi asimilas, kiam nin regas stato de morala malvigleco, la korodajn elementojn emanantajn el ĉiaj Inteligentoj, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, kiuj agordiĝas al ni en la kampo de nia agado kaj influo.

Projekciante la ŝirantajn energiojn de nia bedaŭro pro propra kulpo, ni preskaŭ ĉiam estas trafitaj de interna *silenta argumentado*, kiu aliigas la bedaŭron, kiun ni komence turnis kontraŭ ni mem, en ĉagrenon kaj koleron kontraŭ aliuloj.

Tiel okazas, ĉar la reflektaj de nia dekliniĝo, kirliĝantaj ĉirkaŭ ni, tuj asimilas aliulajn perturbojn, aŭdigante en la sino de nia animo ĉiujn senvortajn mesaĝojn de ribelo kaj senkuraĝeco, kiuj vagas en la nin envolvanta psika atmosfero. Tiuj reflektaj nin metamorfozas en efektivajn sociajn ribelemulojn, avidegantajn izoliĝon aŭ skandalon, ĉe kiuj ni povus nin fordoni al imagado infektita de la malsanecaj impresoj de niaj kulpoj.

Kaj ĉe tia negativa stato, frapate de la vibroj de malsanecaj sentoj kaj pensoj, ni atingas partan aŭ plenan



malekvilibron de la organisma harmonio, implikante korpon kaj animon en la retoj de malsano difinita per plej komplika diagnozo de la klasika patologio. La kulposento, kun sia tuta sekvantaro el konsekvencaj perturboj, efikos per siaj senĉesaj reflektaj sur tiun regionon de la korpo aŭ de la animo respondan al la motivo de nia rimorso.

Ĉia devodekliniĝo sekvigas penton, kiu, nutrate en la spirito, kuntrenas kruelajn rezultojn, kelkfoje postulante longajn ekzistadojn por relernado kaj riparado.

Pro tio, fali en kulpon necesigas aktivan humilecon por la kiel eble plej rapida restarigo de nia vibra ekvilibro, se ni ne volas la timigan eniron en la lernejon de longaj riparoj.

Ĝuste tial Jesuo, ne nur kiel Dia Majstro sed ankaŭ kiel Saĝa Kuracisto, admonis, ke ni repaciĝu kun niaj kontraŭuloj dum ni ankoraŭ iras kun ili. Per tio, li instruis al ni konstrui la veran feliĉon sur la fundamento de la pura amo kaj de la senĉesa pardono.

## 23

### Helpo

Helpi volonte estas reflekti la Dian Vivon pere de la vivo de nia “mio”, kiu vastiĝas kaj nobliĝas laŭmezure kiel ni fordoniĝas impulsate de helpemo.

La Eterna Providenco estas la rezervujo de la Sublima Amo. En konstanta disdonado, Ĝi bezonas esprimkanalojn, kiujn Ĝi, por tiun Amon distribui, provizas kun matematika precizeco.

Estas al ni tamen necese, vigli en nia propra provizejo, por ke ni ne malhelpu tiun *eternan donadon de Nia Patro* kaj ja senĉese transdonu la bonaĵojn, per kiuj Li riĉigas nin.

Kiu observas la principojn de elektro, tiu nepre scias, ke la konstanta fortofluo, kiun ĝi estigas por

efektivigi siajn bonefikojn, postulas kompletan cirkviton. Se ne estus polusoj pozitivaj kaj negativaj, ni ne disponus la bonojn de lumo kaj movo.

Kiu same observas la fonton, tiu scias, ke la akvo, por resti pura, postulas defluejon.

Tial ĉia obstrukco signifas inerton kaj malsanon.

La leĝo pri helpo permesas la peton sed ĝi ankaŭ ordonas distribuon, por ke la helpo ne malhelpu.

Sango ne cirkulanta kaŭzas nekrozon, kiu signifas kadavriĝon en viva korpo.

Homo, kiu scias administri multenombran havaĵon, per ĝi konstruante bazon por la laboro kaj edukado de multaj aliaj homoj, estas kvazaŭ digo aganta en la sociala kampo - nome misiisto de progreso, kiun la leĝoj de la vivo nutras per espero kaj sano, sekureco kaj ĝojo; male, tiu, kiu retenas multenombrajn havaĵojn sen ia utilo por la komunumo, estas ombra englutejo flanke de la vojo - ja bedaŭrinda uzuristo, kiun tiuj samaj leĝoj de la vivo ĉirkaŭas per angoro kaj timo, soleco kaj sekeco. La helpo, kiun ni ricevas, respondas al la helpo, kiun ni donas. Kaj la helpo, kiun ni donas, nepre estas ĉiam sekvata de virtualaj aldonoj por la okazo, se ni fariĝos ankoraŭ pli utilaj.

Ni do memoru, ke reflekti la benojn de Dio, ĉe la memvola helpo al la proksimulo, ne influate de la tamburado de l' vanteco, kiu stimulus nin al ekskluzivismo, estas altiri la reflektajn de Dio sur tiujn, kiuj, vivante ĉirkaŭ ni, same senbrue venas renkonte al ni kaj al ni donas efektivan helpon.

Helpi per la sento, la ideo, la parolo kaj la ago, helpi ĉiujn kaj ĉiam pliboniĝi estas alvoki favore al ni la plenan helpon de la vivo.

Ni do ne forgesu, ke la helpo, kiun ni faras al la homoj, senpostule kaj senpage, estas nia silenta preĝo al la Dia Helpo, kiu al ni senŝanĝe respondas per la lumo de kunlaboro kaj provizado.

## Humileco

Humileco, estante dia forto, lume reflektiĝas en ĉiuj kampoj de la Naturo, kiuj ja bildigas la Tronon de Dio, favorante progreson kaj renoviĝon.

Helgrandioza, la Suno ĉiutage kisas la vizaĝon de la marĉo, sen plendkrioj kontraŭ la kota insulto; la floro senparade incensas la ĉielan gloron. Filtrita tra la aspraĵoj de la roko, la akvo fariĝas pli pura, kaj, post la grandaj plagoj, herba tegaĵo kovras la kampon por ke la homo rekomencu sian laboron.

Pro manko de humileco, kiu esence estas agnosko de nia malgrandeco antaŭ la Universo, aperas en la homa animo malsanecaj kistoj de la sento kiel orgojlo kaj

ambicio, egoismo kaj vantamo, kiuj ja kaŭzas malpacon kaj krimadon en ĉiuj direktoj.

Ne reflektante humilecon, atributon de Dio en la regno de l' "mio", la kreito sin rigardas absoluta posedanto de ĉio ĉirkaŭ si kaj ne atentis sian realan karakteron de spirito iranta la evoluan vojon. Kaj, kondukante sian ekzistadon laŭ partikularisma kriterio, li aliigas sian animon en citadelon de iluzio, en kiu li rifuzas kontakton kun la fundamentaj realaĵoj de la vivo.

Sub la fascinpotenco de tia negativa sintenado, li vipas per sia ribelemo ĉiujn provantajn inklinigi lian spiriton al utila uzado de la horoj, ĉar ekster la atmosfero de l' humileco li ne sukcesas malimplikiĝi el la ombroreto, per kiu li ankoraŭ ligiĝas al la regiono de la besteco, kiun ni ĉiuj forlasis, aŭreoliĝinte per la racio.

Regata de la spirito de ekskluziva posedo, la animo senreziste inkliniĝas al malespero kaj ĵaluzo, al envioĉagreno kaj malmodero, estigantaj la psikan tension, el kiu fontas danĝeraj sindromoj en la organismo, kiel la nerva deprimado kaj la emocia malekvilibro, la ulceriĝo kaj la ĉela misfunkcio, sen paroli pri la bedaŭrindaj okazaĵoj de la ĉiutaga vivo, en kiuj la manko de humileco estas la ĉefa instiganto al frenezo ĉe plej doloraj pasiaj konfliktoj.

Kiu portas la laŭrojn de tiu preskaŭ ne konata virto, senĝene akceptas la devon labori kaj servi por la bono de ĉiuj, tiel ricevante la benon de la ekvilibro kaj konkretigante la manifestiĝon de la Diaj Leĝoj, kiuj neniam distrumpetas siajn donojn.

Humileco ne estas sklaveco. Ĝi estas super ĉio sendependeco, interna libereco fontanta el la profundaĵoj de la spirito kaj subtenanta lian konstantan renoviĝon por la bono.

Kulturi humilecon signifas iri antaŭen sen kateniĝi; estas projekcii tion plej bonan el sia memo sur la vojojn de la mondo; estas forgesi ĉian malbonon kaj ĝoje rekomenci, en ĉiu tago, la taskon de amo.

Ĝin reflektante, el la Ĉielo sur la Teron, kiel garantiaĵon de elaĉeto kaj beleco, la Kristo de Dio naskiĝis sur la pajlo de la Ŝtaltrogo kaj adiaŭis la homojn sur la brakoj de la Kruco.

## Toleremo

Toleremo sidas en la bazo de ĉia efektiva progreso.

La pecoj de ĉia ajn maŝino sin reciproke eltenas favore al la produktado de difinitaj bonaĵoj.

Ĉiuj donoj de la Naturo konsistigas vastan sinsekvon da manifestiĝoj de tiu benata virto, kiu inspiras la veran fratecon.

Toleremo tamen ne estas supraĵa koncepto.

Ĝi ja estas viva reflektado de la komprenemo, kiu fontas, klara, el la animo, estigante esperon, paciencon, pardonon kun plena forgeso pri ĉia malbono.

Peti, ke aliuloj pensu per nia kapo, signifus postuli, ke la mondo konformiĝu al niaj kapricoj, dum nia devo



estas mem digne adaptiĝi al la mondo kun firma preteco helpi ĝin.

La Dia Providenco ĉie reflektas la saĝan kaj aktivan toleremon.

Dio ne postulas, ke la semero tuj produktu la koncernan specion. Al ĝi li donas tempon por ĝermi, kreski, flori kaj frukti. Li ne petas la rivereton pri improvizita integriĝo al la ĝin atendanta maro. Li malfermas al ĝi vojojn sur la grundo, donante la tempon necesan, ke ĝi venku sian iradon.

Tiel same, de animo al animo, nepre necesas, ke ni neniel perfortu.

La krudeco de homo impulsiĝema kaj la koleremo de neĝentila malsanulo, simile al besta krifo kaj al rozuja dorno, elmontras la naturajn signojn de ilia evolua pozicio.

Kontraŭmeti malamom al malamo naskas detruon.

Kiu vundas, tiu altiras malbonon sur sin mem. Tial malbono efikas malbone nur kontraŭ sia aŭtoro mem. Ĝin reciproki do, laŭ ĝia senpripensa karaktero, estas asimili ĝian venenon.

Nepre necesas trakti sensciecon per tiu sama medikamenta kareso, kiun ni uzas por kuraci ulceron, ĉar senkaritata batado de vundo estus tio sama, kiel aliigi kuraceblan malsanon en neforigeblan kriplajon.

Tiakaŭze, toleremo estas super ĉio absoluta forgeso pri ĉia malbono kaj senĉesa servado al bono.

Kiu ĉiam havas surlipe vortojn de pardono, elmontras plezuri ĉe la ĉagreno, al kiu, perdante tempon, li akomodigas.

Pardoni estas forgesi la ombron, serĉante la lumon.

Pardoni ne estas genufleksi aŭ ascendi galeriojn de falsa supereco, afektante elkorajn impulsojn, sed ja persisti ĉe la renoviga laboro, kreante bonon kaj harmonion, per kiuj la homoj, nin ne tuj komprenantaj, rigardus nin alimaniere, kaptante la signifon de nia senvorta idiomato el ekzemploj.

Revenante el la tomo renkonte al la desapontiĝintaj disĉiploj, la Kristo montras al ni la modelon de la ideala toleremo. Sen aludi la dekliniĝon de Petro aŭ la malfortaĵon de Judaso por buŝe vortigi sian pardonon, li atentigas pri la elaĉeta penado, ilin instigante rekomenci la apostolan laboron por la eterna bono.

Toleri estas reflekti la fratecan komprenemon, kaj pardono ĉiam estos sekura profilakto ĉie certiganta sanon kaj pacon, renovigon kaj trankvilon.

## 26

### Preĝo

La preĝo estas dia movo de la spegulo de nia animo turne al la Supro, por reflekti ties grandecon.

Ni parolas pri la arda alvoko de spirito al la Ĉielaj Potencoj, ĉu vestita en la vorta esprimo, ĉu tute senvorta, per la silenta, vibra mesaĝo.

Ni prezentu al ni, ke la surfaco de spegulo estas turnita al la Suno kaj deturnas ties brilegon en abismon.

Esence, ĉi tiu estas la funkcio de la preĝo, nome serĉi la Dian Amon por koncentri ĝian lumon sur la valojn de nescio kaj sufero, de mizero kaj malamo, kiuj ankoraŭ kovras la mondon.

Ĝi grade altiĝas, ekde la plej simpla deziro, eksteriĝanta el malsuperegaj estaĵoj, ĝis la dia ekstazo de la anĝeloj, kaj pro tio sur la Tero nenio efektiviĝas ne impulsate de tiu strebo gvidanta la iradon de ĉiuj kreitoj.

La preĝo estas la movo, kiu tenas la ciklopan korpon de la planedo en la kosma kadro; en la oceano ĝi estas la tajdo, montranta la aspiron de la akvoj al la granda ekvilibro; en la planto ĝi montriĝas en fototropismo, nome strebo de l' kreskaĵo leviĝi al la lumo por asimili ties principojn; en la animalo ĝi estas la instinkto de scivolo kaj esploro, kiuj formas bazon al la unuaj konkeroj de ĝia intelekto, kaj en la ordinara homo ĝi sin montras en la natura pripenso, kiu antaŭas ĉian konstruon sur la homa vojo.

La instruisto preparanta sian lecionon kaj la kuracisto sin koncentranta en siaj studoj por kuraci difinitan malsanon; la administratoro programanta la plenumon de tiu aŭ tiu alia servo kaj la inĝeniero absorbiĝinta en la verkado de plano por difinita konstruaĵo ja utiligas la preĝoprocedojn, reflektante en siaj pensoj la celojn de la edukado kaj de la kuraca scienco, de la leĝoscienco kaj de la progreso, kiuj fluas el la nevideblaj regionoj, kiel abstraktaj ideoj, antaŭ ol substance montriĝi en la mondo.

Preĝi estas harmonii kun la plej alta fonto de potenco en la tuta Universo, ensorbante ĝiajn rezervojn

kaj respogulante la leĝojn pri konstanta renovigo, kiuj regas la fundamentojn de la vivo.

La preĝo agigas la kaŝitajn energiojn de la koro, ilin liberigante, kun la imagoj de nia deziro, per la viva, plastikiga forto de la penso, kaj tiuj imagoj, suprenflugante al Superaj Regionoj, atingas la nin ĉirkaŭantajn intelektajn estaĵojn, videblajn aŭ nevideblajn, per kiuj ni ordinare ricevas la respondojn de la Dia Providenco, ĉar la Ĉiobonfara Patro ankaŭ manifestiĝas pere de tiuj siaj filoj, kiuj iĝas bonfaraj.

La volo, kiu preĝas, gvidas la koron, kiu sentas. Tiel, ĝi produktas lumigajn reflektajn, per kiuj la spirito silente ricevas, sub la formo de inspiro kaj intima helpo, la influon de la Diaj Kurieroj, direktantaj lian evoluon programon kaj al li renovigantaj la senton kaj la penson, per kiuj perfektigiĝas lia ekzistado.

En la preĝo ni disponas la plej altan sistemon de komunikiĝo inter la Tero kaj la Ĉielo.

Per la dia preĝo-cirkvito, la kreito petas la Kreinton pri helpo kaj la Kreinto respondas al la kreito laŭ la nekontraŭebla principo de la spirita reflektado, al li etendante la Eternajn Brakojn, por ke li altiĝu el la valoj de la vivo fragmenta sur la suprajn de la Venka Vivo.

## Obsedo

Se mediumeco estas agordo, obsedo estas ekvilibro de malsuperaj fortoj sin reciproke respegulantaj.

Estante fenomeno de pura kaj simpla reflekto, ĝi okazas ne nur en la direkto de la tiel nomataj *mortintoj* al la tiel nomataj *vivantoj*, ĉar efektive ĝi ofte aperas inter la enkarniĝintaj Spiritoj mem, sin reciproke subjugigantaj per la nevideblaj fadenoj de la sugestio.

La menso, kiu celas alian menson, kreas imagojn por iĝi rimarkata kaj komprenata, kaj ĝi ne bezonas la parolon kaj la agon por enŝoviĝi, ĉar, aplikante ripetadon, ĝi trafas la deziratan celon, sin projekciante sur tiun menson, kiun ĝi povas influ. Kaj se la celata menso

alagordas al la kreiva ondo, kiu sur ĝin ĵetiĝas, ekestas vigla forto-cirkvito, en kiu parolo kaj agado fortikigas la reciprokecon, tiel formante la sorĉo-rondon, en kies limoj obsedanto kaj obsedato enfermiĝas, agante kaj reagante, unu sur la duan.

Ne ekzistas do unuflanka obsedado. Ĉiu tiaspeca okazaĵo nutras sin per pli aŭ malpli senmanka interŝanĝo. Ju pli vigle estas tenataj la malsuperaj imagoj, de unu Spirito al la dua, en reĝimo de konstanta interŝanĝo, des pli profunda fariĝas la obsedo, ĉar ili ja foriĝas de la klara realo en la regionon de ombro, lasante sin regi de reciproka fascino.

Simile okazas al ŝtono submetata al ĉizado. Ju pli ripetigi la movo de l' ĉizilo, des pli funde kaviĝas la sulko fiksona detale la bildon.

Ni ankoraŭ memoru la ordinaran diskon, en kies subtilaj enranĉaĵoj konserviĝas la sonoj gravuritaj por nia laŭplaĉa ripetado. La obsedita menso ofte similas la ebonitan platon, registrante ordonojn kaj avertojn de la obsedanto (ĉefe dum la ordinara dormo, kiam ni liberigas niajn reflektajn sen la kontrolo de nia periferia konscienco), kiujn ordonojn kaj avertojn la obsedato preskaŭ aŭtomate plenumas, same kiel pasivulo en magnetiza eksperimento plenumas posthipnotajn sugestiojn.

Ju pli ni interne cedas al tiu aŭ tiu alia ideo, des pli forte ni al ĝi konvertiĝas kaj nin fordonas al ĝiaj celoj.

Ja tiamaniere ekestas strangaj perturboj, kiuj en multaj okazoj rezultigas malsanon kaj deprimon, aflikton kaj frenezon, krom ankaŭ krueleco kaj morto.

Ĉia obsedo komenciĝas per la malpreciza bildiĝo de aliula penso nin kaŝe trafanta. Hodiaŭ ia ombroguto, morgaŭ neta streko kaj poste vigla sceno, el kiu ni asimilas bedaŭrindajn sugestojn, kiuj nin enfermas en tenebrajn kirlojn.

Nepras do, ke ni kapablu sentime eviti la iluziojn de senfareco, ĉar la senokupa spegulo de nia ombra vivo povas longe kaptiĝi kaj koruptiĝi de la potencoj de l' malbono, kiuj, nin vampirizante, etendas sur aliuloj la inferajn retojn de mizero kaj krimo.

Doni novan nutraĵon al la menso pere de nobliga studo kaj sin pacame dediĉi al senĉesa servado: jen la ideala formulo por liberiĝi de ĉiuj katenoj, ĉar per la akirado de benoj por la spirito kaj per la memvola helpo al la nin ĉirkaŭanta vivo ni ĉiam reflektos la Supron kaj fine antaŭeniĝos, de la mensa blindeco en la dian lumon de la Dia Vidado.



## Malsano

Neniu rajtas aserti, ke ĉia malsano estas ligita al la ellaboriĝ-procesoj de la mensa vivo, sed estas tute certe, ke la ellaboriĝ-procesoj de la mensa vivo efektive influas ĉiujn malsanojn.

Estas malsanoj, kiuj sendube plenumas gravan rolon en la purigado de la spirito, aperante kun la homo ĉe la lulilo aŭ lin akompanante, jaro post jaro, ĝis la tombo.

La denaskaj inhibicioj, la neatenditaj mutiloj kaj la malfacile kuraceblaj malsanoj nediskuteble klasiĝas, en la kadro de la necesaj elprovoj, tiel same, kiel certaj medikamentoj nepre devas enskribiĝi en la preskrib-slipoj

de malsanulo; tamen, en la ordinara vivo, la patologiaj simptomoj, en frakase grandega plimulto, rezultas el la malsuperaj reflektoj de la menso sur la portilon de niaj manifestiĝoj, estigantaj malordojn ĉe ties konsistigaj elementoj.

Ĉia kruda emocio efikas sur la korpon simile al forta martelfrapo sur la strukturo de sentiva aparato, kaj ĉia aflikto, karese nutrata, malbonigas ĝian funkciadon kvazaŭ ruiniga rusto.

La nuntempa medicino scias, ke ĉia mensa streĉiteco kaŭzas gravajn malordojn en la fizika korpo.

Post kiam efektiviĝis la spirita perturbo, la salivaj glandoj preskaŭ ĉiam haltigas sian sekreciaron, kaj la stomako, en spasma stato, rifuzas produkti la kloridan acidon, estigante digestan misfunkciadon, manifestiĝantan per la tiel nomata mukoza kojlitio. Post kiam fariĝis tiu primara fenomeno, kiu ofte malfermas pordon por timegindaj organaj malordoj, ripetiĝas gastrointestaj perturboj, kiuj fine ruinigas la nutroprocesojn koncernantajn la nervan stimulon, el kio rezultas diversaj simptomoj, ekde la plej supraĵa iritiĝo de la stomaka membrano ĝis la malfacile sondebla frenezo.

Ombra penso malbonfartigas sanan korpon kaj pligravigas la malbonojn de malsana korpo.

Se estas neprudente veneni la fiziologian aparaton per la ingesto de substancoj, kiuj ĝin katenus al miskutimo, ankaŭ nepre necesas eviti la spiritajn malbonmoraĵojn, kiuj al ĝi trudas hontigajn perturbojn, kiel tiuj ĉerpitaj en la elreviĝoj kaj ĉagrenoj, kiujn ni adoptas kiel konstantan turmenton por nia interno.

Flegi ofendiĝemon kaj bedaŭron, incitiĝemon kaj ĉagrenon estas tio sama, kiel semi kaj sterki magnetajn dornejojn en la emocia grundo de nia ekzistado; estas propravole toksi la ŝtofon de la karna vesto, difektante la centrojn de nia profunda vivo kaj sekve ruinigante sangon kaj nervojn, glandojn kaj viscerojn de la korpo, kiun la Dia Providenco al ni donas inter la homoj, cele al la disvolviĝo de niaj kapabloj por la Eterna Vivo.

Ni do havu, ĉe ĉiuj paŝoj de nia irado, komprenemon kaj paciencon, senlaca bonkorecon kaj edifan toleremon, ĉar nur koste de la senĉesa renoviĝo de nia menso por la bono, kun la apogo de nobla studado kaj konstanta servado, ni ja sukcesos superregi la malsanon, utiligante la donojn de la Sinjoro kaj evitante la letalajn reflektojn kuntrenantajn la neintencitan sinmortigon.

## Morto

Ĉar la menso estas la spegulo de la vivo, ni tial facile komprenas, ke sur ĝia surfaco elstaras, okaze de la morto, tiuj imagoj plej profunde gravuritaj de niaj deziroj, dank'al interna senĉesa, reflektado. Kaj ĉar la penso - fluideca plasm - havas la proprecon precize substanciĝi siajn kreaĵojn, al ili donante kelkatempan vivon kaj movon, la plimulto el la surteraj homoj, ĉe la tomba transiĝo, restas nature obsedata de siaj propraj imagoj, katenita al halucinaj fenomenoj, same kiel fariĝas dum la ordinara dormo, en kiu, en la plimultaj okazoj, la enkarniĝinto, anstataŭ disiĝi de la fizika korpo, restas ligita al ĝi, suferante la reflektajn de la krudaj sensaĵoj, al kiuj li ankoraŭ altiriĝas.

Ĉiuj sferoj de la ekzistado, por adaptiĝi al la edukprocesoj, bezonas la kutimon, ĉar ĉiuj konkeroj de la spirito efektiviĝas surbaze de refaritaj spertoj.

La klasoj estas vastaj sektoroj de specifa laboro, konkretigantaj, per longa reflektado, siajn apartajn celojn en tiuj, kiuj ilin konsistigas.

Ja tial la junulo destinita al tiu aŭ tiu alia kariero devas submetiĝi, en la lernejoj, al difinitaj disciplinoj, inkluzive la antaŭan sperton de la instruistoj, kiuj ilin antaŭiris en la elektita profesio.

La estonta militisto frue lernos manipuli la armilojn, kulturante la instruojn de la eminentaj strategiistoj, kaj la medicin-studento devos ripeti, dum sinsekvaj jaroj, la instruojn kaj eksperimentojn de la specialistoj, antaŭ ol fari la Hipokratian promeson.

En ĉiuj profesiigaj lernejoj ni vidas instruistojn alkonformigi infanojn, junulojn kaj plenkreskulojn al la principoj aprobitaj en tiu aŭ tiu alia stud-branĉo kaj fiksantaj ĉe ili apartan karakteron por difinitaj celoj, surbaze de la sistema mensa reflektado, en formo de lecionoj persiste konstantaj kaj progresivaj.

Universitata diplomo kerne signifas tempoatestan pergamenon pri ripetitaj spertoj nepre necesaj por ke

lernanto regu certan kampon de la sciado cele al servado en kolektivo.

Laŭ tiu sama principo, la morto liveras la ateston pri la ripetitaj spertoj, al kiuj ni adaptiĝis, ĉar ĉiu spirito, pli aŭ malpli, fariĝas tio, kion li imagis. Ja tiamaniere la morto, eltirante la ĉiomon de nia mensa enhavo, devigas nin kelkatempe resti ene de ĝi. Se tiu enhavo estas la bono, ni rajtos al kvoto da ĉielo responda al la pli bona parto de la konstruaĵo, kiun ni starigis en ni mem, kaj se tiu enhavo estas la malbono, tiam ni nepre restos enfermita en tiu ero de la infero responda al niaj malbonaj agoj tiel longe, ĝis estingiĝos, per meritita elpurigado, la infero, kiun ni mem kreis en la interno de nia konscienco.

Ĉio kontraŭa al la leĝo de amo kaj de progreso, ne havanta renoviĝon kaj sublimiĝon kiel bazon, estigas la mensan enkistiĝon, kiu estas nenio alia ol la produktado de personaj reflektoj, akumuliĝintaj kaj havantaj nenian valoron por la cirkulado de la komuna bono, kiuj reflektoj prezentas la fiksideojn formantajn la atmosferon, en kiu ni transtombe spiras, simile al efektivaj frenezuloj tre malproksimaj de la vera realo.

Ĝuste tial, *morti* signifas pli profunden penetri en la mondon de nia memo, konsumante longan tempon

por demeti la tunikon de niaj malpli noblaj reflektoj aliformiĝintaj en halucinan regionon de nia ombra fiksideismo; aŭ, kontraŭe, simple translokiĝante de unu sfero en alian, plibonigante la atmosferon el niaj reflektoj harmoniantaj kun la bono, antaŭeniĝante, laŭ sinsekvaj ŝtupoj, al novaj horizontoj de ascendo kaj lumo.

## Amo

La pura amo estas la reflektado de la Kreinto en ĉiuj kreitoj.

En ĉio ĝi brilas, en ĉio ĝi pulsas per unu sama vibrado de saĝo kaj beleco, estante ja fundamento de la vivo kaj justeco de la tuta Leĝo.

Ĝi aperas, sublima, tiel en la ekvilibro de la mondoj pendantaj en la gloro de la senlimo, kiel ankaŭ en la nekonataj floroj forgesitaj en la kamparo.

En Ĝi brilegas, bonfara, la animo de ĉiuj religioj, kiuj naskiĝas en la fluo de la civilizacioj kiel sistemoj de fido serĉantaj komunikiĝon kun la Ĉiela Boneco, kaj en ĝi radikiĝas ĉia impulso de interhoma solidareco.



Dia plasmio, en kiu Dio envolvas ĉian kreaĵon, la amo estas Lia spiro mem penetranta la Universon.

Ni tiel ĝin rigardas kiel silentan esperon de la Ĉielo, atendantan la evoluon de ĉiuj principoj kaj respektantan la decidon de ĉiuj konsciencoj.

Dank 'al tia beno, ĉiu estaĵo estas protektata sur la vivoŝtupo, en kiu li troviĝas.

La vermo estas amata de la Sinjoro, kiu al ĝi donas milojn kaj milojn da jarcentoj, por ke ĝi leviĝu el la kota abismo, same kiel la anĝelo reprezentanta la Sinjoron apud la vermo. La suko nutranta la rozon estas la sama, kiu vivigas la ŝirvundan dornon. En la arbo, kie nestas la sendefenda birdo, povas ankaŭ loĝi la serpento kun siaj mortigaj armiloj. En la spaco de pundo domo samsekure spiras tiel la krimulo spertanta la suferon de la kadroj, kiel ankaŭ la honesta administranto, kiu tie certigas la ordon.

La amo, ni ripetas, estas la reflektado de Dio, kiu ĉiujn kompatas kaj neniun perfortas, kvankam, ĝuste pro tiu senfina amo al ni, Li ordonas, ke nin ĉiam regu la leĝo pri respondeco manifestiĝanta por ĉiu konscienco laŭ ties propraj faroj.

Kaj pro sia amo la Sinjoro permesas, ke ni sen templimo ascendu al Li, al ni konsentante, kiam ni

senpripense nin fordonas al la malbono, la eternecon por nia repaciĝo kun la Bono, kiu estas Lia Neŝangebla Regulo.

Ĉar ni estas Liaj heredontoj, radioj de Lia Senfina Inteligento, dum Li Mem, en ĉio kaj en ĉiuj lokoj, estas la Eterna Amo de la Tuta Kreaĵaro, tial Lia Leĝo preskribas, ke ĉiu spirito libere reflektu tion, kion li plej amas, kaj transformiĝu, tie kaj aliloke, en lumon aŭ tenebron, en ĝojon aŭ doloron, al kiuj li oferus sian koron.

Jen kial Jesuo, la Dia Modelo, kiun Li sendis al la Tero por al ni lumigi la vojon, ĉe ĉiu paŝo de sia Agado prenis la amon al la Patro kiel inspiron por sia tuta vivo, amante sen la intereso esti amata kaj helpante sen ia ideo pri rekompenco.

Descendinte, pro amo, en la sferon de l' homoj, pro amo helpante kaj suferante, Li pasas sur la mondo kun la penso levita al la Altega Patro, reflektante Lian saĝan kaj favorkoran volon. Kaj, por ke la vivo kaj la penso de ni ĉiuj reflektu liajn lumajn paŝojn, li postlasis al ni, en la nomo de Dio, la neforgeseblan regulon: - "Amu vin, unuj la aliajn, kiel mi vin amis."

**FINO**